

G

Furio GABBRIELLI

**1927 Viareggio (Italio). Loĝas en Ĝenevo*




Ital-devena svisa ŝtatano, kiu trapasis la lernejojn en Viareggio kaj Pisa (Italio) kaj loĝis en Pisa, Firenze, Milano (Italio). 1944-45 li restadis kun sia patro en la germanaj koncentrejoj de Dachau kaj Kahla; 1949-54 li studis en la universitato de Birmingham (Britio) kaj doktoriĝis pri angla literaturo en la universitato de Pisa (disertacio pri James Boswell); 1953-56 li estis asistanto en la piza universitato, instruisto pri la angla lingvo en duagrada lernejoj. En poststuda kurso por industriaj gvidantoj en 1975 G. transiris al la industrio kaj okupiĝis pri eksporto al afrikaj landoj. Paralele li docentis en la tradukista lernejo de la ĝeneva universitato kaj 1976-84 estis profesoro kaj direktoro de la itallingva sekcio de la tradukista lernejo en Ĝenevo, kie li loĝas de 1960 (post sia emeritiĝo li parte vivas en Finnlando). G. estas subtena membro de la Instituto de lingvistiko kaj kibernetiko de la paderborna universitato. Ofte G. prelegis antaŭ siaj studentoj pri lingvoproblemaj demandoj. Kiel denaska katoliko li transiris en 1970 al la reformita eklezio. G. estas edzo kaj patro de du infanoj.

G. e-istiĝis en 1985 pro kultura intereso kaj pro sia interesiĝo pri la zamenhofa homaranimismo. Li estas membro de la ĝeneva EG La Stelo, de SES kaj UEA. De 1987 li estas ankaŭ libera ano de ISK de AIS.
→Ĝenevo

Claude GACOND

**1931. Loĝas en La Chaux-de-Fonds NE*



Sviso franclingva, naskita en Neuchâtel, kie li frekventis la lernejojn elementan aŭ bazan (1938-45) kaj duagradan (1945-47). Por studi la germanan lingvon G. restadis en la privata lernejo Ecole d'Humanité (Homarana Lernejo de la reformpedagogoj Paulus kaj Edith Geheeb) en Goldern en Berna Oberlando (1947-48). Siajn liceajn studojn (1948-51) G. efektivigis en Neuchâtel en la pedagogia sekcio. Post unujara vizitado de la neŭŝatela universitato (1951-52) G. trapasis la por-instruistan lernejon (Ecole normale, 1952-54) por poste fariĝi instruisto en la vilaĝo La Sagne/NE en la baza lernejo, samtempe donante kursojn al ontaj instruistoj. Dum sia instruista edukado G. fakiĝis kiel pedagogo-didaktikisto por subkapablaj infanoj. En 1974 komenciĝis la dua etapo de lia instruista aktiveco en La Chaux-de-Fonds. Ĝuante la fidon de la lokaj aŭtoritatoj, G. povis okupi duontempan postenon kiel instruisto por daŭrigi, en alia duono, la agadon favore al Eo (CDELI kaj KCE). En 1991 G. akceptis duan duontempan taskon por intensive instrui la francan lingvon al fremdlingvaj lernantoj 16-26-jaraĝaj en la supera metilernejo Centre professionnel du Jura Neuchâtelois (Profesia Centro por la Neŭŝatela Ĵuraso). En 1994 G. oficiale emeritiĝis de siaj instruistaj funkcioj.

Kvankam G. rifuzis la armean servon, lia porpaca sinteno estis objektivite pritaksita pro la fakto, ke jam en la gimnazio kaj universitato li help-servadis kadre de →Civilservo Internacia (SCI), kiu estis gvidata de Pierre Céréssole, kaj des pli, ĉar li estis membro de ĝia svisa komitato. Devigita deĵori kadre de sanitara taĉmento, G. baldaŭ eliminiĝis el la armeo; ĉar la pagadon de la porarmea imposto li rifuzis efektiviĝi, li ricevis la okazon pledi ĉe la tribunalo favore al la civilservo kaj al pli favora solvo por militrifuzantoj.



En la menciitaj medioj G. konatiĝis kun reprezentantoj de diversaj idealismaj movadoj kiel la kvakera kaj la kooperativa, kiu en Romandio estis intime ligita al la socialismo. Dum sia gimnazia kaj universitata tempo en Neuchâtel G. komencis renkontadi plurmaniere →Edmond Privat, kies ĉefverko *Le Choc des Patriotismes* (en Eo: *Interpopola konduto*) profunde impresis lin („tiu verko fakte ne nur decide emancipigis min el la naciismaj ŝovinismoj, sed ankaŭ kondukis min al la liberiĝo el la ricevita religia instruo protestanta, favore al tolerema liberpensado pli universala”, vd. *LF* 172, p. 108). La artikolojn de Privat G. konsultadis en la periodaĵoj *Coopération*, *L'Essor*, *La Sentinelle* k.a. Samtempe G. ekrlatis ankaŭ kun →Pierre Bovet, Henriette Ith-Daneil kaj ties nevo →Henri Vatré, kaj kun multaj aliaj personecoj samideaj. Kiel politikisto G. aktivis kadre de la socialdemokrata partio. Dum 16 jaroj li estis elektita kiel ano de la decida konsilantaro (Conseil général) en la komunumo La Sagne, kiun li havis la honoron prezidi du- aŭ trifoje. Dum

kvar jaroj G. ankaŭ estis deputito en la parlamento (Grand Conseil) de la kanto Neuchâtel, kie li pledis favore al la eksterlandanoj dezirantaj svisiĝi, celante la simpligon de la koncerna proceduro.

En la kultura kampo G. estis aktivulo kaj estas membro de pluraj societoj: Neŭŝatela Geografia Asocio (kies komitatano li estis dum pluraj jaroj), Neŭŝatela Naturscienca Asocio, Neŭŝatelaj Historia kaj Arkeologia Asocioj, Club 44 en La Chaux-de-Fonds. Krom tio G. estas ankaŭ ano de la mondfederalista movado (de 1952).


Hobie Claude kaj lia edzino *Andrée G.-Giroud* (vd. sube) ŝatas migradi piede kaj skie en la montaroj ĵurasaj kaj alpaj, ekskursi per propra aŭtobuseto. Ili estas botanike interesataj, admirantoj kaj defendantoj de la naturo, vizitantoj de kulturaj vidindaĵoj, amatoroj pri pentrado kaj muziko, legantoj de beletraĵoj franc- kaj esperant-lingvaj.



Claude kaj Andrée Gacond

La vivo de G. ne estas disigebla de lia senlaca aktivado por la Eo-movado. Pri Eo G. aŭdis aŭ legis jam en sia infanaĝo. Kiam li volis dokumentiĝi pri Eo en neŭŝatela biblioteko (jam antaŭ Goldern), li trovis nur propagandilojn pri la planlingvoj Ido kaj Occidental, en kiuj Eo estis forte kritikata kiel fiaskinta lingvo. Tiu cirkonstanco malfruigis la esperantistigon de G., sed faris lin scivolema pri Eo kaj aliaj planlingvoj kaj renkontigis lin kun gvidaj funkciuloj de tiuj planlingvoj kiel →Jakob Kreis-Schneeberger (Ido), →Fred Lagnel, →Ric Berger kaj →Alphonse Matejka (Occidental), kiujn li vizitis perbicikle. Post la apero de Interlingua (1951) G. ekhavis

kontaktojn ankaŭ kun →André Schild. En la Homarana Lernejo en Goldern G. ricevis pozitivajn informojn pri la zamenhofa lingvo de sia matematik-instruisto Gerard Cool, kiu estis e-isto. En la civilservo, kie G. ekkonsciis pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj, li konatiĝis ankaŭ kun →Jules Gilliard, →Eric Descoedres, →Edouard Waldvogel kaj ties fratino Clara Waldvogel, kiuj influis lin favore al Eo. Kaj en la arma prizono en Sankt Luzisteig, kie G. renkontis →Michel Frésard, li havis la okazon legi la biblion en Eo kaj studi *Plenan Vortaron de Eo*.



Fakte nur dum siaj studoj en la porinstruista lernejo en Neuchâtel, en aŭtuno 1952, G. komencis, kun aliaj, reale lerni Eon reage al kontraŭ-esperanta kritiko fare de la instruisto Louis Roulet, profesoro pri historio en la universitato, kiu kondukis kiel kontraŭulo de neŭtralaj universalaj lingvoj (respektive artefaritaj planlingvoj), kiuj laŭ li havas senliteraturan statuson. Ĉi tiu sperto vekis en G. la emon kontraŭstari ĉian publikan kaj nejustan polemikon kontraŭ Eo. Tiam G. vizitadis la civilserviston →Jules Gilliard en La Neuveville/BE, kiu posedis riĉan Eo-bibliotekon, por ekstudi la Eo-literaturon. En Neuchâtel G. sekvis Eo-kurson de →William Perrenoud kaj frekventis la lokan EG, kiu kunsidis tiam en la privata lernejo Monruzy de →René-William kaj Nadine Perrenoud.

En 1953 G. partoprenis kun Eric Benoît la IJKn en Wörgl (Aŭstrio) kaj unu jaron poste ankaŭ tiun en Hilversum (Nederlando). Samtempe G. komencis aktivi kiel sekretario de Eo-Junularo de Svislando (EJS), la junulara sekcio de SES, kaj baldaŭ ankaŭ kiel sekretario de Eo-Edukistaro de Svislando (EES),

fondita en 1958. Kun la helpo de Andrée Giroud kaj de ŝia fratino Cosette en 1956/57 G. ekorganizis la internacian junularan skires-tadon en Adelboden/BE dum la novjara periodo. Ĉi tiuj skiferioj estis aranĝitaj 21-foje (ĝis 1977). En 1956 G. ekredaktis la EJS-bultenon *La Juna Voĉo*.

Kiam G. estis instigita de la direktoroj de la porinstruista lernejo Laurent Pauli kaj Adolphe Ischer elekti Eon kiel temon de lia instruista diplomiĝo, G. dediĉis ĝin al la interlerneja korespondado kaj al la pretigo de plano por la eksperimenta instruado de Eo en la baza lernejo. Do dum sia instrua periodo en La Sagne G. ne nur organizis Eo-ekspozicion, sed havis ripete (okfoje) la okazon eksperimente realigi la Eo-instruadon, unue en La Sagne (1956), poste en La Chaux-de-Fonds (1977/78).



En 1962 G. transprenis la funkcion de Eo-prelegisto ĉe Svisa Radio Internacia (SRI), kiel posteulo de →Edmond Privat (1889-1962). Tiun elsendan laboron G. plenumis dum 30 jaroj ĝis 1992, kiam la Eo-programo de SRI estis abolita (→Radio). Dum la vivotempo de Privat G. multe helpis ankaŭ la eldonagadon por la libroj de Privat. Kiam ekde 1954 instaligis kaj en 1967 statute fondigis la planlingva fako →Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds, G. fariĝis ties arkivisto (honorofica). En 1968 sekvis, en kunlaboro kun →August Braun, →René-William Perrenoud kaj aliaj, la fondo de la Eo-studejo →Kultura Centro Esperantista (KCE) kaj de ties fakoj. Ligitaj kun la konstruado de tiuj institucioj

estis liaj membrecoj en la konsulta komitato de CDELI, en la direkta komitato kaj kultura komisiono de KCE kaj en la fonduma konsilio de →Gastejo Edmond Privat (GEP), krome lia laboro kadre de la Kampanjo Eo lernejen, la redaktado de *Monata Cirkulero* kaj de la serio *Studoj*, sed ankaŭ la integra gvidado de sennombraj Eo-kursoj por komencantoj, progresantoj kaj lertuloj kaj la verkado de la perkoresponda kurso de Eo por franclingvanoj. Multaj verkaĵoj (komencitaj kaj finitaj) de G. estas neeldonitaj.



En 1991 G. demisiis de sia nesalajrita funkcio kiel direktoro de KCE. Post sia emeritiĝo G. daŭrigis sian poresperantan aktivecon kadre de CDELI kiel nesalajrita arĥivisto, okupiĝante ankaŭ pri la verkado de *Bibliografio de Eo kaj interlingvistiko laŭ kolektoj de CDELI* kaj de *Didaktikaj konsiloj al instruantoj kaj studentoj de Eo*, kiujn li ellaboras sub la programtitolo 'Gaconda metodo'. Krome li gvidas seminariojn por instruantoj kaj studentoj de Eo (ekzemple en CDELI kaj en la Eo-centro Kvinpetalo en Bouresse, Francio). Por SES, kiun li prezidis inter 1986 kaj 1994 kaj kies honora membro li fariĝis en 2003, li plenumas ekde 1997 la funkcion de redaktoro de ĝia revuo *Svisa Esperanto-Societo informas*. Jam 1969-73 li estis redaktoro de *Svisa Espero*.

Pro la graveco de liaj agadoj pedagogia, instrua, gvida, verka, prelega, kleriga kaj arĥivista, pro liaj sukcesaj klopodoj savi sennombrajn gravajn planlingvajn dokumentojn, minacatajn de malapero kaj detruo, pro lia konstanta laboro por KCE kaj CDELI kaj liaj klopodoj konstrui instruajn kaj klerigajn fundamentojn por la e-istoj, G. ricevis honorigon de pluraj organizaĵoj. En 1991 liaj meri-

toj estis agnoskitaj per la aljuĝo de la unua Eo-kulturpremio de FAME kaj de la urbo Aalen (Germanio) je la valoro de 10'000 germanaj markoj. En 1999 ILEI, kies rajtigita ekzamenanto G. estas, elektis lin honora membro pro liaj didaktikaj aktivecoj, lia kontribuado al la restrukturigo de la Eo-ekzamenoj de UEA/ILEI kaj lia helpo al István Szerdahelyi (1924-87) de la universitato Eötvös Loránd ELTE en Budapeŝto (Hungario), kiun li akceptadis en La Chaux-de-Fonds. Krom tio G. estis honorigita ankaŭ de Internacia Eo-Instituto en Hago (2000) kaj de UEA (2001), kies dumviva membro li estis. G. estas ankaŭ ano de SAT.

Dum siaj multjara kaj multflanka agadoj G. kunlaboris kun granda nombro da e-istoj kaj interlingvistoj kaj praktike spertis la rivalecon inter adeptoj de diversaj planlingvoj. En la senco de Privat peri en tiuj konfliktoj G. ĉiam konsideris kiel sian noblan taskon.

→Neuchâtel →KCE →SES →SRI
 →Instruado de Eo →Junularo →Familioj →Politiko
 →Bibliografio →Antologio

Andrée GACOND-GIROUD

*1933. Loĝas en La Chaux-de-Fonds NE



La edzino de Claude G. (ekde la 17a de majo 1958) kaj emerita muziklerneja instruistino (bekfluto) lernis Eon en 1952 samkiel ŝia edzo sub la influo de →Edmond Privat. Sekve ŝi aktivis en EJS (kiel organizantino), KCE (libroservo), SRI (prelegantino) kaj CDELI (arkivistino). Kiel G., kiu en 1959 estis elektita kiel membrino de la komunuma konsilio de La Sagne/NE sekve al la pozitiva voĉdono de la civitanoj de la neŭŝatela kantono favore al

la civitana egaleco de la virinoj, ankaŭ ŝia fratino, *Cosette Sandoz-Giroud* (1937-2001), laboris kiel instruistino kaj 1969-92 agadis kiel politikistino en La Chaux-de-Fonds, okupante mandaton kiel ĝenerala konsilistino en la leĝodona asembleo de La Chaux-de-Fonds (1969-72). Cosette lernis Eon en 1956 en La Chaux-de-Fonds, ekmembris en EJS, en la loka EG (ĝis 1968), en SAT (ĝis 1965) kaj fariĝis dumviva membro kaj delegito de UEA en sia urbo. Ankaŭ la unua edzo de Cosette, Raoul Cop, siatempe lernis Eon dum la skiferioj en Adelboden. Ŝia dua edzo André Sandoz same lernis Eon kaj iom partoprenas la aktivecojn de la Eo-movado.



Andrée Gacond-Giroud, Cosette Sandoz-Giroud kaj Gabrielle Gacond-Lüscher

La patrino de Claude G., *Gabrielle Gacond-Lüscher* (1908-99), studis en la 1920aj jaroj sociajn aferojn en Ĝenevo por poste labori kiel flegistino de infanoj. Precipe post kiam ŝi vidviniĝis ŝi regule kunlaboradis kun sia filo en KCE kaj CDELI por prizorgi la taskon registri la gazetartikolojn. Malgraŭ alta aĝo Gabrielle G. bone parolis Eon kaj plenumis ankaŭ taskojn kaj oficojn en la neŭŝatela EG. Ankaŭ aliaj familianoj de G. lernetis esperanton.

→Familioj →Junularo

GASTEJO EDMOND PRIVAT (GEP)



KCE/GEP, domoj Naville (dekstre) kaj Bovet (suda flanko)

Paralele al la konstruo de →*Kultura Centro E-ista (KCE)*, asocio laŭ svisa juro, ekde 1974 estis intertraktata kun la urbo La Chaux-de-Fonds la starigo de fondumo (fondaĵo) laŭ svisa juro kun la nomo *Gastejo Edmond Privat (GEP)*, kun la celo disponigi ejojn al la konstruota Eo-altlernejo kadre de KCE/IFA en La Chaux-de-Fonds. La urbaj instancoj, kiuj favoris tiun projekton, koncedis al G. la prioritatan aĉetorajton por sep malnovaj domoj en la kvartalo Postiers-Recrêtes-Cheminots, kvar-etaĝaj kaj kvinloĝejoj (konstruitaj en 1925 por poŝtistoj kaj fervojistoj) je la favora prezo de po CHF 100'000.- kaj aĉetotaj en la daŭro de dek jaroj. La unua prezidanto de la fonduma konsilio de G. estis *André Sandoz*, iama urbestro de La Chaux-de-Fonds kaj eksa registarano de la kantono Neuchâtel. Aliaj membroj (ĉ. 1989) estis Pierre Berger, arkitekto kaj oficisto de la komunumo La Chaux-de-Fonds, Fernand Donzé, kiam li estis direktoro de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds, →Maurice Favre, advokato-notario en La Chaux-de-Fonds, Monique Favre, direktorino de la urba biblioteko, Claude Gacond, Anne Marcanti, instruistino en la Chaux-de-Fonds, Daniel Ruedin, unua sekretario de la instru-ministerio de la kantono Neuchâtel kaj delegito de la justic-departemento por la fonduma kontrolo; aliaj membroj nomiĝis Luc Tissot, industriisto en Le Locle, Lucie Vergriette, redaktorino de la kultura fakvo de La Chaux-de-Fonds kaj delegitino de la urbo. Post la

demisio de unu aŭ alia membro aldoniĝis Jacques-André Humair, direktoro de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds, →Andreas Künzli (en ties funkcio kiel vicprezidanto de KCE), →Giorgio Silfer (kiel reprezentanto de LF-koop) kaj →Mireille Grosjean, instruistino en Le Locle, kiu prezidis la fondumon post Sandoz. En la konstruado de G. estas distingblaj pluraj etapoj:

La unua etapo (de 1974) disvolviĝis ekde la fondo de G. kaj la akiro de la necesaj financoj por aĉeti kaj inaŭguri en 1978 la unuajn du domojn 'Ernest Naville' (strato Postiers 27) kaj 'Pierre Bovet' (29), kie poste estis konstruita la instrualono 'Andreo Cseh'. Ĉe la Kooperativa Banko de La Chaux-de-Fonds estis malfermita ŝparkonto por la kreo de kapitalo, kaj la urbaj instancoj disponigis subvencion de CHF 4000.- por la starigo de oficejo.

En la dua etapo estis realigita la transformado de la unuaj du domoj (oficejoj, centra hejtado, modernigo de la loĝejoj kaj gastĉambroj, same ankaŭ la konstruado de kursejoj, inter kiuj la ĉefa estis baptita je la nomo de 'Klara Zamenhof-Zilbernik'.

En la tria etapo (de 1983) estis akirita la tria domo 'Hector Hodler' (strato Cheminots 26), kies inaŭguron ĉeestis Grégoire Maertens, tiam oficanta prezidanto de UEA, kaj Ivo Lapenna (1909-87), tiama gvidanto de la t.n. Neŭtrala Eo-Movado.

En la kvara etapo (1983/84), kiun minacis la intenco de la nova urba registaro nuligi la kontrakton kun G., la direkta komitato de KCE urĝe konfirmis la akiron de la lastaj kvar domoj (stratoj Cheminots 23, 25, 27 kaj Recrêtes 18), kvankam tiu aĉeto signifis grandan finanĉan ŝarĝon por la fondumo. Tiel G. subite posedis entute sep domojn kun 35 loĝejoj, kies ĉambroj devis esti modernigitaj. En la domo Recrêtes 18 instaligis granda, profesieca kaj multekosta kuirejo, kiu ricevis la nomon je la honoro de →August Braun. Estis planite bapti la ceterajn domojn je la nomoj de →René de Saussure (Cheminots 23) kaj →Reto kaj →Cezaro Rossetti (27). Estis antŭvidite, ke KCE, kiam G. reale posedos la sep domojn, kiujn ĝi akiris, fariĝos la sidejo de la Instituto Internacia Edmond Privat.



Claude Gacond kaj André Sandoz



Inaŭguro de la domo Hodler en 1983. Sur la foto Claude Gacond, Grégoire Maertens (prezidanto de UEA) kaj Ivo Lapenna (Neŭtrala Eo-Movado)

Estas interese menci, ke G. ricevis la statuson de ŝparkontejo, kio signifas, ke fidemaj pruntantoj povis malfermi ŝparkonton ĉe G. kaj pruntedoni monsumojn por ebligi la akcelon de la transformado de la domaro. La konstanta jara interezo estis 4,5 procentoj. Tiel inter 1975 kaj 1982 la kapitalo kreskis de CHF 30'000.- al CHF 542'000.-.

En 1988 kiel prezidantino de fonduma konsilio G. sekvis →Mireille Grosjean, kiu sam-

tempe transprenis la prezidon de la direkta komitato de KCE de sia antaŭulo *Jean-Jacques Lavanchy*. En 1988 alvenis *Mario Bélisle* (*1961), kanada civitano, kiu transprenis la taskon de financa administranto de G. Kiam fine de 1990 Bélisle prezentis detalan analizon pri la financa stato de G. kaj KCE kune, evidentiĝis grandega malekvilibro en la librotenado: laŭ tiu kalkulo la diferenco superis unu milionon da svisaj frankoj, dum la ĝeneralaj ŝuldoj al la banko kaj al la alpruntintoj sumiĝis je sfr. 2'700'000.-. Tiu ĉi negativa saldo havis plurajn kialojn. Ĝin kaŭzis ne nur la malkapablo rikolti pli da enspezoj el klientoj, gastoj, luprezoj kaj servoj, sed ĝin influis ankaŭ la ĝenerala plikostiĝo de la vivo kaj la altiĝo de la hipoteko-interezoj, la kostoj por la rekonstruado de la domoj, la salajroj de dungitoj, aliaj kostoj. Fakte la statuto de G. antaŭvidis, ke kiam unu loĝejo liberiĝas pro foriro de la luanto, KCE uzu ĝin por propraj priesperantaj aktivecoj, kondiĉe ke la sufiĉaj monrimedoj flanke de la e-istaro povu balanci la financojn. Ĉar tiu regulo ne estis strikte observata, okazis preskaŭa kolapso de la tuta entrepreno. Por tamen eviti ĝin, la fonduma konsilio de G. decidis reekvilibrigi la bilancon per la vendo de minimume kvin domoj. Sed la ĝenerale akriĝinta krizo sur la kampo de la senmoveblaĵoj en Svislando kaŭzis lantan vendoprocezon (unu el la domoj, ĉe Recrêtes 18, estis aĉetita de la alternativa lernejo La Grande Ourse, kie Eo estas instruata). En kunlaboro kun la urbaj instancoj kelkaj G.-loĝejoj estis dume disponigataj por la gastigo de rifuĝintoj kaj azilpetantoj.

Interkonsulte kun la fonduma konsilio de G., en 1992 la direkta komitato de KCE donis al si la taskon provi novan starton funkciigi la centron per iom refreŝiĝinta koncepto. Salajritaj dungitoj denove garantiu pli profesionan laboron de KCE kaj G. Kiam post du pliaj jaroj evidentiĝis, ke malgraŭ la intensaj klopodoj la financa situacio ne esence stabiligis, necesis serĉi drastan solvon. La ĝisnuna teamo retiriĝis, la oficistoj estis maldungitaj, la librotenado de G. estis strikte separita de tiu de KCE. Dum la fonduma konsilio kun iom modifita membrokonsisto daŭrigis funkcii kiel administranto kaj observanto de la vendo de la domoj, la gvidaj taskoj de la

asocio KCE estis transprenitaj flanke de funkciuloj identaj kun tiuj de Kooperativo de →Literatura Foiro (detalojn vd. →Kultura Centro E-ista). Sekve estis enkondukita disiga procezo inter KCE kaj G. kun la celo, ke G. solvu mem siajn financajn problemojn kaj KCE povu memstare daŭrigi sian ekzistadon kiel asocio, seeble kun unu aŭ du domoj. En januaro 1997 la fonduma konsilio de G. decidis, ke ĝi pretas vendi ambaŭ domojn al KCE kontraŭ la transpreno de la ŝuldoj (ĉ. 700 mil frankoj). Cetere SES kiel unu el la kreditantoj konsentis rezigni je la interezo kaj promesis ne repostuli la monon ĝis la jaro 2002, kondiĉe ke la domoj apartenu al KCE. En oktobro la komitato de KCE reviziis sian aĉetan planon, pretante aĉeti nur unu domon (Postiers 27) kontraŭ 400 mil svisaj frankoj. Kiel raportite en septembro 1997, la domo Bovet (Postiers 29) povis esti vendita al privatulo. El la vendo eĉ restis sumo, kiun parte ricevis KCE, parte CDELI donace kiel kun KCE/G. kunlaboranta fako de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

La 14an de junio 1999 estis subskribita kontrakto, per kiu la lasta domo (Naville) de G. transiris en la posedon de KCE. Per tio KCE do ne plu estis luanto, sed fariĝis posedanto de la parcelo. Samtempe G. repagis ĉiujn siajn ŝuldojn al pli ol 60 kreditantoj. Post tiu paŝo la fondumo G., kies lasta formala prezidanto estis *Mario Bélisle*, ne plu estis bezonata kaj likvidita en januaro 2001.

→Kultura Centro Esperantista →Neuchâtel

GAZETARO NACILINGVA

La nacilingva G. de Svislando frue interesiĝis pri la demando de neŭtrala universala lingvo kaj ne hezitis raporti pri. Neŭtralaj universala lingvoj signifis por la samtempanoj ĉiam interesan aŭ iom kuriozan objekton, kaj ne mankis ardaĵoj por kaj kontraŭ la afero mem kaj ĝiaj protagonistoj. Inter la unuaj lokaj gazetoj, kiuj skribis pri la temo, troviĝis ekzemple *Journal du Locle* (ekz. en 1908), *Neue Zürcher Zeitung* (1909), *Nebelspalter* (1911), *Tagblatt der Stadt Thun*, *Thalwiler Anzeiger*, *Ostschweizeri-sches Wochenblatt*, *St. Galler Tagblatt* (ĉiuj 1912), *Burgdorfer Tagblatt*, *Le Journal de Genève* (1913), *Tribune de Genève* (1917) k.a. En 1913 *Der*

Bund (Berno) detale raportis pri la 9a Universala Kongreso de Eo, ankaŭ *Neue Zürcher Zeitung* dediĉis al tiu evento plurajn artikolojn, same pluraj svisaj, ankaŭ alemanaj gazetoj menciis la planlingvajn diskutojn ĉe →Ligo de Nacioj en la 20aj jaroj (ekz. *NZZ*, 14.9.1922 kaj 23.9.1922). En 1939 *Der Bund* produktis specialan suplementon pri la UK okazinta tiujare en la svisa ĉefurbo. Sendube plej multaj artikoloj aperis en svisaj gazetoj okaze de universalaj kongresoj, do en 1913, 1939, 1947 kaj 1979. Per tio ili konsiderinde kontribuis al la disvastiĝo de la atento pri la mondlingva ideo flanke de vasta publiko.

Ankaŭ post la dua mondmilito la G. daŭrigis vigle verki pri la internacilingva demando. Sufiĉe bonaj artikoloj estis publikigitaj en la 50aj jaroj lige kun la Eo-rezolucio de Unesko aŭ kun la inaŭguro de Salono Edmond Privat en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds post lia morto en 1962. En la 30-40aj jaroj kaj ankaŭ poste precipe *L'Essor*, *Le Nouvel Essor*, *La Sentinelle* kaj *Le Coopérateur genevois* aperigis la artikolojn de →Edmond Privat. Dank' al la klopodoj de →Arthur Baur, kiu dum jardekoj eldonis la gazetaran servon *Esperanto-Information* de SES, kaj de →Tina Peter-Rüetschi en *NZZ* povis aperi de tempo al tempo tre trafaj artikoloj pri Eo kaj la internacilingva demando.

La tenoro de la G. rilate al Eo ĝenerale estis pozitiva aŭ bonvola, neŭtrala, informa, scivolema, afabla, respektama, aŭ skeptikema. Negativaj kaj polemikaj kontribuadoj estis unuopaj, kompare maloftaj, kaj evidentiĝis, ke ĝiaj verkintoj ofte estis ne sufiĉe serioze dokumentitaj. Inter la plej strangaj titoloj eblis legi ekzemple *Esperanto - eine Sprache sucht Sprecher* (*Basler Zeitung*, 4.8.1981), *Esperanto: Hoffen auf bessere Zeiten* (*Basler Zeitung*, 10.8.1981), *Weltsprache ohne Zuhörer* (*Berner Zeitung*, 14.7.2003), *Esperanto als Retortenprodukt* aŭ simile. Alia artikolo en *Berner Zeitung* (29.12.1981) portis la titolon *Irreale Idealvorstellung? Weltsprachen auf der Suche nach Anerkennung*. Por *Basler Zeitung* Eo signifis esperon de filologoj (*Eine etwas angegraute Philologenhoffnung*, 11.1984) aŭ simple artefaritan lingvon sen kultura fono (*Kunstsprache ohne kulturellen Hintergrund*, 7.10.1982), falsa argumento ofte aŭdata kaj ripetata, ĉar plej ofte

mankas la necesaj konoj kaj difinoj en tiuj kazoj. En *St. Galler Tagblatt* (14.6.2000) oni povis legi pri Eo kiel senanima konstruaĵo (*seelenloses Konstrukt*). En sia eldono de 25.11.1986, *NZZ* por iu pritema artikolo trovis jenan titolon, alude al la kompleta fiasko de Eo: *Globale Marktkommunikation – der grösste Flop seit Esperanto*.

Komparante artikolojn en samaj gazetoj de diversaj periodoj, oni povas konkludi, ke kutime tiuj samaj gazetoj ne estis liberaj de akraj kontraŭdiroj. *Luzerner Neuste Nachrichten* malkovris en la e-istoj specon de konspirantoj (24.2.1986): *Einer Verschwörung nicht unähnlich versammelten sich die Vereinsmitglieder und hielten ihre GV in Esperanto ab*. Sed 11 jarojn antaŭe (5.9.1975) *LNN* devis almenaŭ konfesi, ke finfine oni ne povas multon diri kontraŭ tia artefarita mondlingvo: *Viel wird gegen eine solche 'künstliche' Weltsprache eingewendet, wenig lässt sich aber tatsächlich einwenden*. Certe ne mankis ankaŭ atakoj kontraŭ la protagonistoj de Eo mem: Ekzemple por la revuo *Femina* (12.7.1978) la e-istoj estis ne pli ol speco de sekto: *Der Klub der Unentwegten mit der seltsamen Sprache (...das tönt nach Sekte)* kaj prezentis kiel lingvan ekzemplon *Fihundo heisst Sauhund*. En la sama periodaĵo sekvis letero de legantino, kiu rekomendis lerni Interlingua anstataŭ Eo.

Interesa fenomeno ĉe la G. raportantaj pri Eo koncernas la *metaforan uzadon* de la nocio Eo en pluraj kuntekstoj. Jen kelkaj ekzemploj: Lige kun la flugado en la kosmon dum la 60aj jaroj aperis la vorto *Weltraumesperanto* (*Brückenbauer*, 4.11.1966). Kiam oni skribis pri la lingvo Fanakalo kiel ligilo de la blankaj kaj nigraj minejaj laboristoj en Sudafriko, la G. parolis pri *Minen-Esperanto* (*Der Landbote*, 2.11.1967). Lige kun gestikulado en sporto estis uzita la esprimo *L'Espéranto du basketball* (*Radio TV*, 15/1976). Kiam aperis la planlingvo Rumanĉ Griŝun, iuj gazetoj parolis pri *Esperanto-Romanisch*, *Bündner Esperanto* respektive *un espéranto romanche* (*Construire*, 8.8.1990). En alia kazo, la angla lingvo estis nomita *Anbandelungesperanto* por eksterlandaj virinoj, kiuj en siaj ferioj flirtas kun grekaj viroj, uzante pli malpli lertan anglan lingvaĵon (*NZZ*, 23.8.1979). La angla lingvo en la rolo de la

nova Esperanto de la eŭropanoj (Blick 22.9.1988, Le Démocrate, 20.9.1988) kaj de *eidgenössisches Esperanto* aŭ kiel *Esperanto der Eidgenossen* ankaŭ estis aktuala temo de tempo al tempo lige kun la diskuto pri la lingua franca (ekz. NZZ, 30.10.1979; Oltner Tagblatt, 11.2.1988; Schweizerische Kaufmännische Zeitung, 23.9.1988); la ekvivalento franclingva *espéranto fédéral* estis renkontebla ekzemple en Le Courrier Uvacim (8/1980). La gazetoj Grenzpost am Zürichsee (16.10.1987) vidis la anglan lingvon kiel *Parlaments-Esperanto*, Blick (22.9.1988) kaj Le Démocrate (20.9.1988) eĉ proklamis la anglan lingvon kiel novan Eon de la eŭropanoj, aŭ skribis: *Anglais: moderne espéranto* (L'Hebdo, 22.9.1988). Krome la vorto Eo aperis jen kaj jen en kunteksto de la diskuto pri la enkonduko de la angla lingvo en la bazajn lernejojn. La lucerna gazeto Vaterland (3.8.1979) uzis la terminon Eo por la koncepto de *Gross-Familie-Sprache*. La hispana lingvaĵo uzata en Meksiko estis nomita *Esperanto-Spanisch* (Blick, 17.6.1986), kaj la specifa varianto de la angla lingvaĵo, kiel ĝi estas utiligata en flughavenoj, ricevis la mokesprimon *désespéranto* (La Romandie, 19/1986). Tiu vorto estis utiligata ankaŭ en la senco de malfacile tradukeblaj esprimoj (L'Est Vaudois, 8.5.1989). Se oni ne plu komprenis la fenomenojn de la naturo, oni skribis: *Die Sprache der Natur ist zu einem Esperanto geworden, das niemand versteht* (Berner Oberländer Nachrichten, 7.6.1979).

La sekva ŝerco, kiu aperis en Nebelspalter (30.1.1979) cirkulis inter kritikantoj de Eo:

Filo: Paĉjo, kio estas Esperanto ?

Paĉjo: La ĝenerala mondlingvo.

Filo: Kaj kiu parolas ĝin?

Paĉjo: Neniu.

Multajn jarojn poste, *Blick* eĉ aperigis bildstrion samsencan kaj samcelan (15.7.1998).



Bildstrio en *Blick* (1998)

Lige kun la egalrajtoj de virinoj aperis la metaforo *Emanzenesperanto* (Aargauer Tagblatt, 7.3.1986). Komiksoj senhezite estis denunciataj kiel *Esperanto por senalfabetuloj* (Schweiz. Mechaniker Zeitschrift, 12/1987; Basler Zeitung, 25.9.1991) kaj *Pictogramme – das Esperanto der Orientierung?* estis legebla kiel demando en la revuo *Industrie-Flash* (5/1987). Eĉ religian rolon aŭ idealigon Eo ricevis en L'Hebdo (6.12.2001): *Amen: espéranto de la foi*, kaj en *Echo Magazine*, (Genève, 5.6.2003), kiu titolis iun artikolon per *L'esprit pentecôte – un espéranto spirituel*. Ankaŭ por sportistoj la nomo Eo kaptis specialan signifon, nome *Muskel-Esperanto*, se temis pri aktivecoj de sportorganizoj (Das Magazin 4/2002). Krome Eo kiel metaforo estis uzata en la kazo de *Bhangra - das musikalische Esperanto der Exil-Indier*, kiam tiuj aplikas diversajn stilojn en sia tradicia muziko (Luzerner Neuste Nachrichten, 1.3.1989 kaj 15.8.1989). En aliaj kazoj, en *Basler Zeitung* (29.11.1997 resp. 6.12.2000) la terminoj *visual esperanto* kaj *Foto-Esperanto* estis uzitaj por esprimi la universalan lingvon en ĵaz-muziko kaj en fotografado, *NZZ* (17.5.96) analoge utiligis la titolon *Festival-Esperanto* por filmo. Lige kun la spektaklo *Urfaust*, *NZZ* (29.10.1993) enkondukis la esprimon *Taubstommen-Esperanto* (t.e. por surdmutuloj) kaj *Esperanto als Körpersprache* (kiel gestoj) vidis *Aargauer Tagblatt* (21.12.1991) en la spektaklo *Antigone de Sofoklo*. La firmao *Charles Vögele* uzis la esprimon *Esperanto in Blue* por iu serio de vestaĵoj (*Zolliker Bote*, 25.3.1988), kaj en *Brückenbauer* (27.6.2000) Eo ricevis metaforan signifon ankaŭ por *Fussball*.

Kiam la komputiloj kaj la novaj komputilaj lingvoj fariĝis popularaj, ne malofte Eo estis metafore uzata por komputilaj lingvoj (*Computer-Esperanto*): lingvoj kiel Java (*un*

espéranto logiciel, LNQ, 4.11.1997) aŭ telekomunikaj normoj kiel EDIFACT, X.400 aŭ la ASCII-kodo ricevis tiam la metaforon de Eo informadika (*Eine Art Esperanto der Telekommunikation, elektronisches Esperanto, globales Esperanto des Computerzeitalters* ktp., en: Computerworld Schweiz, 11.3.1987; Appenzeller Tagblatt kaj Der Landbote, 14.11.1989; Management Zeitschrift, 1/1990; Tages-Anzeiger, 18.3.1991). Por L'Hebdo (11.11.1988), la sistemo UNIX, por Gazette de Lausanne (15.4.1987) la sistemo Ada signifis entute *l'espéranto des ordinateurs*, kaj reprezentanto de IBM esprimis la esperon, ke ĝia normo X/Open pli sukcese disvastiĝos ol la lingvo Eo (Höfner Volksblatt, 29.7.1988). La softvaro Groupware estis nomita de BCOM informatique (4/2001) *espéranto nouveau*. Finfine Brückenbauer (25.4.2000) difinis la nocion *Cyberslang* kiel specon de Eo, per kiu en la globala mondo oni povas interŝanĝi bazajn informojn.

La metafora uzado reaktualiĝis lige kun la „nova babelata turo” en Eŭropo (ekz. *Sprachenbabylon Brüssel* en Badener Tagblatt, 2.10.1993). Lige kun tiu temo Eo estis uzita en la senco *Einheits-Europäisch* (BAZ, 13-14.2.1999; NZZ, 28.4.1999). Iuj gazetoj eĉ reelfosis la nomon Volapük por karakterizi precipe la terminologian konfuzon en Eŭropa Unio (Tages-Anzeiger, 30.12.1992). Ne estas do miraklo, ke ankaŭ la nova monunuo Euro estis titolita per *Esperanto-Mono*. Pri ĝi kiel fi-mono la konata germana verkisto Martin Walser trovis siaspecan komparon: *Der Euro eröffnet das Zeitalter des praktischen Esperanto. Er ist ein Ungeld wie das Esperanto eine Unsprache ist.* (Tagblatt St. Gallen, 3.1.2002). Zeitlupe (4/1998) esprimis la esperon, ke la lingva riĉeco pluvivos malgraŭ ia eventuala *Euro-Esperanto*. Nebelpalter (9.10.1995) taksis, ke privatigita Bundeswehr estas *Esperanto-armeo*.

En la 1980aj jaroj iuj gazetoj kiel Basler Zeitung, Bieler Tagblatt, Schweizerisches Kaufmännisches Zentralblatt k.a., deklaris Eon kaj la planlingvan movadon senŝancaj kaj ne funkcipovaj. Por Bündner Zeitung (27.5.1987) Eo ĉiukaze estis nenio alia ol *Retortenprodukt*. Malgraŭ tiu negativa pritakso, okaze de la 100-jara jubileo de Eo en

1987 sennombraj periodaĵoj trovis inde pozitiveraporti pri lingvo kaj movado, eĉ *Jüdische Rundschau, Das Gelbe Heft* kaj *Meyers Modeblatt*. La centjariĝo de Edmond Privat, kiu estis ripete menciita en pluraj gazetoj, konkludis en 1989 tiun jardekon. En la 90aj jaroj la tono de iuj gazetoj al Eo akriĝis en la negativan, ironian direkton, tiel ke la e-istoj ne nur devis sin pli vigle defendi kontraŭ plej diversaj atakoj flanke de la amaskomunikiloj, sed tiel ke oni devis subkompreni, ke gazetoj kiel NZZ kaj Le Nouveau Quotidien proklamis Eon definitive fiaskinta kaj morta aŭ almenaŭ ridinda kaj por la nuntempo ne plu alloga ideo (ĉar la angla lingvo venkis ktp.). Akran protestreagon flanke de la konsternitaj e-istoj kaŭzis iu fuŝa mokartikolo de Marc Lacaze en Le Nouveau Quotidien (24.11.1991). Kiel alian ekzemplon de samspeca ironia fiartikolo en la senco de nekrologo eblas mencii *Nachruf aufs Esperanto* en NZZ-Folio (10/1994). Ankaŭ ĉi tiu publikigo ne restis sen adekvata reespondo de e-istoj.

Sed almenaŭ la romanda gazeto Le Matin (22.10.1995) ŝajne iom komplete trovis atenginde, ke *Non, l'espéranto n'est pas mort*.

Se do Eo ankoraŭ ekzistas, tiam laŭ Susann Sitzler, libera ĵurnalistino svis-devena, vivanta en Berlino, maksimume kiel *slango* de diversaj *amikaroj, simplaj homoj* kaj *internaciaj familioj* vivantaj en la periferioj de germanaj urboj. Malgraŭ ia simpatio, por tiaj ‘modernaj’ ĵurnalistoj, kies skribstilo estas same brila kiel sarkasma, Eo estas primokinda kiel neplu tempo-konforma strangaĵo, reprezentanta la eternan *klišon de la teda, iel justa afero* (Weltwoche, 22.7.1999). Jam en 1990 iu regiona zurika gazeto plendis pri la misformiĝo de la lingvouzo (*Kauderwelsch*) kaj pri *Echtes Zürcher Inglesi-Esperanto* kiel kurioza slang-lingvaĵo de zurikaj gejunuloj.

Krom pri la monda lingvoproblemo, pri la fremdlingva instruado kaj Eo ĝenerale aŭ Eo en lernejoj, la gazet-redakcioj pretis publikigi ankaŭ raportojn pri unuopaj e-istoj, kiuj vekis apartan publikan atenton (krom pri Serge Reverdin alias Parzival’ ankaŭ pri →Dante Bertolini, →Friedrich Bierhoff, →Edmond Privat, →Madeleine Stakian k.a.). Aperis ankaŭ sciigoj, ke eblas vojaĝi pere de Eo, aŭ pri okazaĵoj de SES kaj de lokaj Eo-societoj, inkluzive de lingvokursoj, kiel ekzemple en

Coopération en oktobro 1953. Komence de la 90aj jaroj la G. raportis pri la sorto de N.I. Sequoyah (Billy Ray Waldon), ĉeroka indiano kaj e-isto, kiu en 1992 en Kalifornio estis kondamnita al la mortpuno. Pri lia nesolvita sorto interesiĝis krom zurikaj e-istoj ankaŭ →Olivier Tzaut (vd. ankaŭ *HeKo*, n-ro 247, reta eldono).

Kie ekzistis aktivaj Eo-agadoj, ekzemple en La Chaux-de-Fonds (KCE/CDELI), Lucerno, Wil, Biel-Bienne, Tiĉino ktp., tie aperis plej ofte artikoloj en la loka G. La efiko de la iom bizaraj aktivecoj de →Serge Reverdin alias Parzival' en Biel-Bienne, pri kiuj la loka G. ofte kaj volonte, sed ironie raportadis, estis ke fakte multaj homoj aŭdis diversmaniere pri Eo, kvankam oni opinias la aferon iom stranga. Kiam la gazetartikoloj alprenis tro mokan kaj sarkasman tonon, tiel ke la risiko ridindigi la aferon de Eo reale ekzistis, la Eo-responsuloj ne timis interveni ĉe gazetredakcioj aŭ urbaj aŭtoritatoj por atentigi, ke Reverdin ne estas reprezenta persono de la Eo-movado.

Negativaj kontribuaĵoj havis kelkfoje ankaŭ la efikon, ke iuj aŭtoroj pli profunde okupiĝis pri la planlingva temo, ol se gazeto simple presis novaĵon de agentejo. Nova institucio kiel KCE en La Chaux-de-Fonds kompreneble provokis la lokajn ĵurnalistojn raporti ne nur plaĉe kaj flate, sed ankaŭ kritike kaj ironie. Tiel en L'Impartial (6.8.1985) oni povis legi inter tute pozitivaj konsideroj pri Eo ankaŭ la verdikton, ke tiu lingvo ne savos la mondon: *L'espéranto ne sauvera pas le monde.*

Kiam la e-istoj sentis sin maljuste traktitaj, la plej kompetentaj inter ili (ĉefe →Claude Piron, →Claude Gacond, →Mireille Grosjean, →Arthur Baur, →Bruno Graf k.a.) ne hezitis sendi protestleterojn al la redakcioj de la koncerna gazeto, en kiu aperis negativa, fuŝa aŭ stulta kontribuaĵo pri Eo. En iuj kazoj necesis postuli la korektadon de la falsa bildo pri Eo. Plej ofte la redaktoroj afable respondis kaj pretis aperigi leteron de leganto aŭ artikolon kun la kontraŭa vidpunkto.



Nebelspalter de la 6a de julio 1944. Sube troviĝis la frazo: La batalo por mondlingvo. Se la koro ne ĉeestas, tiam ĉiuj klopodoj je interkompreniĝo estas vanaj.

Pergazetara observado: En 1975 CDELI/SES komencis aboni la servon Argus, kiu disponigis ĉiujn artikolojn el la svisa G., kiuj mencias la vorton Eo. Tiel povis esti sisteme kolektataj ĉiuj gazetartikoloj, kiuj raportis pri Eo aŭ aliaj planlingvoj. La unika gazetartikola kolekto de CDELI, sur kiu baziĝas tiu ĉi raporteto, komenciĝas jam en la jaro 1908, kaj estas, dank' al la regula kunlaborado de pluraj e-istoj (Claude Gacond, Gabrielle Gacond, Hélène Berger k.a.) ĝisdatigita ĝis antaŭ nelonge. La rikoltadon de la gazetartikoloj akompanas detala statistiko laŭ konkretaj pritaks-kriterioj, kiu donas sciigojn pri la enhavo kaj sinteno de la esploritaj gazetartikoloj. Inter la plej ofte kaj regule pri Eo raportantaj gazetoj tra la jardekoj troviĝis do la sekvantaj titoloj:

Coopération, La Sentinelle, Neue Zürcher Zeitung, Neue Berner Zeitung, L'Essor, Feuille d'Avis de Neuchâtel, L'Éducateur, L'Impartial, Der Eisenbahner, Basler Nachrichten, Basler Volksblatt, Basler Woche, Basler AZ, Baslerstab, Bieler Tagblatt / Seeländer Bote, Die Botschaft (Klingnau), Der Bund, Cenobio, Le Cheminot, Construire,

COOP-Genossenschaft, Corriere del Ticino, Le Courrier (Genève), Il Dovere, Il Ferroviere, Feuille d'Avis de Lausanne – 24 heures, FAN Feuille d'Avis de Neuchâtel - L'Express, Gazzetta Ticinese, Giornale del Popolo, Journal du Jura, Le Jura Bernois, Der Landbote, Libera Stampa, Luzerner Neuste Nachrichten, National-Zeitung (Basel), Nouvelle Revue de Lausanne, Oberländisches Volksblatt, Die Ostschweiz, Popolo et Libertà, St. Galler Tagblatt, Schweiz. Bodensee-Zeitung, Les Services publics VPOD, La Suisse, Tages-Anzeiger, Tagwacht (Bern), Die Tat, La Tribune de Genève, Vaterland (Luzern), Walliser Bote, Wiler Zeitung, (Wir) Brückenbauer, Anzeiger des Wahlkreises Thalwil, Berner Zeitung, Brugger Tagblatt, COOP-Zeitung, Le Démocrate (Delémont), L'Eco di Locarno, L'Est Vaudois, Gazette de Lausanne, Grenzpost am Zürichsee, Die Heimat (Emmenbrücke), Journal de Genève, Journal de Nyon Ouest Lémanique, La Liberté (Fribourg), Luzerner Tagblatt, Nidwaldner Tagblatt, Nordschweiz – Basler Volksblatt, Oltner Tagblatt, Ostschweizer Tagblatt, Das PTT Personal, Rivista di Lugano, Schweizerische Handels-Zeitung, Tessiner Zeitung / Südschweiz, Verkehrs- und Staatspersonal, 24 heures, Zuger Tagblatt, Zürichsee-Zeitung.

Sur la listo de ĉefaj gazetoj, kiuj aperigis krom pozitivaj aŭ neŭtralaj ankaŭ negativajn aŭ ironiajn artikolojn, troviĝas Basler Zeitung, Berner Zeitung, Bieler Tagblatt, Bote der March und Höfe, Freiburger Nachrichten, Glarner Nachrichten (1981), Basler Zeitung, Bieler Tagblatt, FAN L'Express, Gazette de Lausanne, La Liberté (1982), Bieler Tagblatt, FAN L'Express, Gazette de Lausanne, L'Impartial, La Liberté, Vaterland (1983), Le Démocrate, Journal de Genève, Journal du Jura, Journal suisse des Employeurs de commerce, Le Matin, La Suisse, Tribune Jurassienne, Zürichsee-Zeitung, Gazzetta Romontscha, Grenchner Tagblatt, Kaufmännische Praxis, Solothurner AZ, Berner Tagwacht, Vaterland, Neue Zürcher Zeitung (1984), Journal de Bienne, Le Matin, Ouest lémanique, Tribune Jurassienne, 24 heures,, Zürichsee-Zeitung, Zofinger Tagblatt (1985), Construire, Grenzpost am Zürichsee, L'Hebdo, 24 heures, Nouvelle Revue de

Lausanne (1987), Schweizerische Lehrerzeitung, L'Impartial, Nouvelliste et Feuille d'Avis du Valais (1988), poste ankaŭ Le Nouveau Quotidien kaj Le Temps.

Post la jaro 2000 en la CDELI-kolekto estas disponeblaj relative malmultaj Eo-gazet-artikoloj (intertempe oni rezignis pri la multekosta abonado de Argus).

Dum la jaroj 1999-2001, Le Temps en Genève aperigis rubrikon verkitan en t.n. *Europanto*, nova lingvaĵo inventita de la itala verkisto Diego Marani (*1959), tradukisto en la ĝenerala sekretariejo de la Konsilio de Ministroj de Eŭropa Unio en Bruselo. En tiu rubriko, kiu konsistis el multaj unuopaj kontribuajoj, la aŭtoro rakontis en humura maniero epizodojn el la moderna Eŭropo – la teksto celis esti facile komprenebla, ĉar ĝi estis konstruita el vortoj komunaj, oftaj aŭ tuj rekoneblaj en diversaj eŭropaj lingvoj. Ĉi tiu 'lingvoprojekto' ricevis ne nur lokon sur la paĝoj de grava romanda ĵurnalo, sed estis prezentita ankaŭ en Expo 02 en Yverdon, kie okazis la nacia svisa ekspozicio de la jaro 2002. Cetere la nomo Europanto aperis en L'Hebdo kaj Le Nouveau Quotidien jam en 1997 (18.9. kaj 31.12.) kaj en Facts (12/1999). (→ Interlingvistiko, Europanto)

Kiam iu romanda e-isto kun miro skribis al la redakcio de Le Temps kaj proponis ripeti la saman rubrikon en Eo, la ĉefredaktoro de la gazeto rifuzis la sugeston kun la argumento, ke tia rubriko en Eo estus redunda, alivorte do superflua. Ĉu do temas pri provo komplete absurdigi la lingvan konfuzon en Eŭropo kaj la diskuton pri neŭtrala universala lingvo? Ĉu la lingvo Europanto, kiun Le Temps decidis prezenti al siaj legantoj, estas la 'moderna' respondo al la lingva demando en Eŭropo, en kiu Eo evidente ne plu estas konsiderata kiel serioza propono aŭ studinda alternativo?

La iom pli serioza diskutado pri Eo reaperis kiam en 2005 estis publikigitaj en la ĝeneva gazeto Le Temps la kontribuajo *Anglais, «la mauvaise solution»* de François Grin (22.5.) kaj en Le Courrier *Espéranto: L'insulte faite à Babel* de Anne Pitteloud, okaze de la 90a UK en Vilno. Grin, profesoro pri ekonomio en la Lernejo de tradukado de la ĝeneva universitato, diris en la koncerna intervjuo, ke Eo (scenaro 3), estus, kompare kun la

opcioj «ĉio-nur-angla» (scenaro 1) kaj «*plurlingvismo*» (scenaro 2), la solvo plej ideala de la lingvo-problemo en Eŭropo, ĉar malmultekosta kaj justa. (→Antologio)

Eblas konkludi, ke la svisa G. ja abunde konsideris kaj atentis la temon de la neŭtrala universala lingvo, praktikante ian atendo-sintenon rilate la enkondukon de tia lingvo, kiu finfine ne okazis. Observeblas do granda abismo inter la optimismo de planlingvaj adeptoj mem, kiuj, firme kredante je la utileco de la planlingva ideo, klopodis vekti publikan atenton kaj varbi por Eo pere de la G., kaj la skeptiko de ĵurnalistoj, neadeptoj, malsimpatiantoj aŭ kontraŭuloj de planlingvoj, kiuj konservis siajn antaŭjuĝojn aŭ eĉ sian rifuzan sintenon vidalvide de la ekzisto aŭ adopto de neŭtrala universala lingvo.


→Ĵurnalismo, ĵurnalistoj

GEONISMO

Pens- kaj agokoncepto propagandata ekde 1955 de →*William Perrenoud* (1898-1984) pere de la *Fundamento de G.* Per sia projekto Perrenoud celis la konscian kreadon de tuteca homa kulturo kaj, kadre de tio, la devastigon de la praktika aplikado de Eo, ĝuste en periodo de akceliĝanta unuiĝo tutmonda. La *Internacia Kurso pri Eo kaj G.* disvolviĝis en la →Kastelo Münchenwiler/BE. La deksex-paĝa broŝureto *Fundamento de G.* estis la ĉefa legaĵo por tiu kurso, samtempe manifesto kaj bazo por diskuto. En siaj sciencaj kaj filozofiaj priokupoj, Perrenoud, kiu entreprenis kvazaŭ-eldonejon kun la nomo *Geoniaj Eldonoj*, mem multe interesiĝis pri la evoluo de la universo, de la tero kaj de la homaro kaj pri la demando kiel atingi pli da kohero inter tiuj dimensioj.

Perrenoud difinis la G. kiel „vivkomprenon, kiu ne postulas unuformecon“, komprenante sub ĝi la unuecon de la nuntempa kulturo, kaj per ĝi sugestis la „studadon de ĉiuj kulturdemandoj, kiuj koncernas la Teron en ties tuteco, kiu celas formi konsciajn homojn kapablajn je tutmonda kunlaboro.“ Tiuj konsciaj homoj estis laŭ Perrenoud la klarvidaj e-istoj, kiuj laŭ li fariĝos la „avangardo de la Homaro“ („Iru senlime antaŭen, e-istoj, sur la larĝa vojo de l’geonia kulturo kaj de l’progreso!“ p. 6). Por Perrenoud G. estis sinonimo de la

„Nova Humanismo“, el kiu estas rekte dedukteblaj la absoluta neceso de la neŭtrala universala lingvo, la esperantismo, la interna ideo. En G. konkretiĝas la esencaj rilatoj inter Eo unuflanke kaj la homara historio, la scioj pri la evoluo de la Tero, lingvoj, matematiko, arkitekturo, navigado, naturobservado, de la komencoj de la ekzistado ĝis hodiaŭ, aliflanke. Eo estas geonia lingvo, la e-ismo kongruas kun G. kaj la e-istoj estas geonistoj, kiuj per sia e-isteco posedas realan kulturalan funkcion en la hodiaŭa mondo kaj fariĝos grava socia forto („Geonio estas la Respubliko de l’Homeco, de l’Scienco, de l’Arto, en unu vorto de la Kulturo“, p. 10). Sed diference de mondcivitanaĵaj teorioj, la geonistoj ne estas kosmopolitoj: ili ja opinias, „ke la nuntempa kulturo estas unueca“, sed „ili ne celas miksi senpripense ĉiujn kulturojn. Ilia intenco kaj faro estas: elekti tiujn elementojn en la naciaj kulturoj, per kiuj la „geonisma kulturo“ estas konstruata. Plej decidite la geonistoj estas kontraŭ „ŝovinismo, genocido, rasa persekutado, nobelaj privilegioj kaj pretendoj“ (p. 13). Perrenoud proklamis sian G. kiel „disvolviĝon de la Interna Ideo de Eo“ (p. 15), kiel „blovon, per kiu alte flamos la fajro zamenhofa“; geonisto „vidas en ĉiu homo nur homon kaj taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj laŭ liaj agoj“, p. 13). Per tio, Perrenoud, dezirante aktuale kaj tutece reesprimi la humanismajn valorojn de la zamenhofa idearo, nepretervideble alproksimiĝis ankaŭ al la hilelismo kaj al la *Deklaracio pri Homaranismo* de L.L. Zamenhof.



William Perrenoud

Perrenoud, kiu krome estis influata ankaŭ de la antropologiaj studoj de Teilhard de Char-

din (1881-1955), mem ne inventis la terminon „geono“. Li trovis ĝin en la franclingva verko de la franc-pol-devena kuracisto-filozofa Hélan Jaworski, *Le Géo ou la Terre vivante* (geono aŭ la vivanta Tero, 1928), kiun li legis ne longe post ĝia apero. Laŭ la kompreno de Perrenoud, „geono“ signifas la unuecan aŭ unikan Teron, estratan de la Homo. El tiu termino Perrenoud derivis la nociojn „geonio“, „geoniano“, „geonismo“, „geonisto“.

Kritiko: Kun sia G. Perrenoud post ĝia apero baldaŭ alfrontis skeptikon ĉe siaj samtempanoj. La koncizeco de la broŝuro, kiun Perrenoud produktis, kiu per malmultaj paĝetoj provis klarigi multegon, misefikis. Laŭ Gaccond tro resuma estis lia alvoko al neŭtrale homa planedismo, tro sektece sonis ĝiaj imperativoj, ĝia futureco kaj ĝiaj multaj majuskulaj proklamoj. Kvankam oni konsentis pri la ĝeneralaj ideoj esprimitaj en la G., oni tamen ne sentis la bezonon krei la neologismon „geono“ por reesprimi la e-ismen respektive homaranismon zamenhofan kaj priskribi la aktualan mondon. La dramo de la geonisma manifesto de Perrenoud do estis, ke ĝiaj postuloj estis tro abstraktaj, tro idealismaj kaj profetotaj. Kvankam ĝi celis disradii optimismon inter la e-istoj, kio ĉiam estas necesa kaj bonvena, ĝi postulis tutecan komprenon ne ĉiam troveblan inter ili. Sekve G. kaŭzis ne nur malkomprenon ĉe multaj neintelektaj samideanoj, sed krom tio ĝi do restis entute nematura afero, nelaste pro la malsaniĝo kaj izoliĝo de ĝia aŭtoro, kiu mem elpaŝis iom fanatike kun siaj instruoj. → Marcel Jaccard organizis la geonismajn prelegojn de Perrenoud en Zuriko.

Same denseca stilo karakterizas la du metodikajn broŝurojn eldonitajn de Perrenoud: → *La ora metodo* kaj *En tempo rekorda* (→ Instruado).

→ William Perrenoud → Instruado → Neuchâtel
→ Kastelo Münchenwiler

Walter GIANNINI

1914-2003



La filo de svisaj gepatroj vivantaj en eksterlando (la familio originas el Quinto/TI) unue studis muzikon en Majenco (Germanio). Krom tio G. dediĉis sin al la liberekonomiaj instruoj de Silvio Gesell, al la vivoreformo de Werner Zimmermann kaj al la kant- kaj hejmmuzika movado. En 1931 G. aliĝis al la alternativa ĝardenkonstrua kolonio Schurrenhof en Donzdorf en Virtembergo (Germanio). Pro kritika artikolo en svisa gazeto kontraŭ la hitlera reĝimo li estis kondamnita je malliberejo. En 1934 li povis translokiĝi al Svislando dank' al sia duobla ŝtataneco, daŭrigante sian agrikulturan instruigon en la lernejo por biologia terkultivado en Ebmingen/ZH, kaj poste servis kiel kamplaboristo en Maur/ZH. En 1939 li ĉesis aktivi en la agrikulturo kaj lernis en Zuriko la profesion de flegisto por helpi psike kaj mense malsanajn homojn. En 1942 li gvidis kun sia edzino Emma la porinfanan kolonion en Francio (funkciigata de la Svisa Ruĝa Kruco), kie li savis judojn de la persekuto far la nazia polico. En 1943 G. ree ekstudis muzikon en la zurika konservatorio ĉe Ernst Hörler, kies posteulo li fariĝis. G. kunlaboris ankaŭ kun Rudolf Schoch, la zurika pioniro de la bekfluto, kaj kontribuis al la popularigo de la muzikinstruado kaj ĥorkantado inter ĉiuj popoltavoloj. Krome li iniciatis, kunfondis kaj administris la Svisan Laborkomunumon por junulara muziko kaj muzikedukado (SAJM), kiu havis 1500 membrojn, kaj redaktis ĝian oficialan bultenon. Kiel liberpensulo G. estis ano de la politika partio Landesring der Unabhängigen (LdU).

G. lernis Eon en 1921 en Majenco pere de Adam Hund. Li estis fonda membro de EES (1958), ano de SES, UEA, KELI (1965) kaj ano de la zurika ES, kies prezidanto li iam estis. En la 1950aj jaroj li sponsoris la titolpaĝon de *La Juna Voĉo*, la bulteno de EJS.

Jules GILLIARD

1901-1962



Laŭprofesie G. estis mekanikisto (mekanika ilaristo) kaj ĝardenisto, fraŭlo loĝanta en La Neuveville/BE (de 1940), kiu malkovris Eon en la 1930aj jaroj tra la →Civilservo Internacia, en kiu li aktivis. Li partoprenadis la kunvenojn de la neŭŝatela EG kaj de SES, forte interesiĝis pri lingvaj demandoj kaj posedis riĉan Eo-bibliotekon, en kiu troviĝis verŝajne unika plena kolekto de la unuaj broŝuroj de Zamenhof, de liaj cirkuleroj kaj de la revuo *La Esperantisto*. Post la dua mondmilito G. organizis kun →Fritz Liechti kaj →Edouard Waldvogel la helpagadon favore al la malsataj germanoj. Ankaŭ →Claude Gacond fariĝis e-isto sub la influo de G., kiu en la 40aj jaroj estis redaktoro de *SER* kaj delegito de UEA; 1945-47 G. estis prezidanto de SES kaj en 1947 membro de la LKK de la berna UK de tiu jaro. Lia forpaso pro akcidento sendube estis granda perdo por la tiam a Eo-movado.

→Svisa Esperanto-Societo



GLARUS

Kantono en centra-orienta, germanlingva Svislando, (germ. Glarus, mallong. GL: 685 km², 38'000 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Glarus.

G. troviĝas inter tiuj svisaj kantonoj, kie la planlingva respektive Eo-movado ne sukcesis establiĝi, kvankam tiu ja iom izolita montara regiono estas sufiĉe forte industriigita kaj certe ne suferas pro manko de eksteraj kontaktoj. *SE* 1/1906 raportis, ke la loka gazeto *Glerner Nachrichten* en sia rakonto 'Ein Gang durchs Glarnerland im Jahre 1925' priskribis la vivon de la glarusanoj post 20 jaroj. Laŭ la vizio de la aŭtoro tiam liaj samkantonanoj havos internaciajn rilatojn kaj parolados Eon kun ĉiuj popoloj de la tero. La Eo-revuo *Vespera Horo* aludis en 1910 la ekziston de loka EG en G. Post tiu dato la fontoj silentas pri Eo en tiu kantono, kun la escepto de la mencio de Pius Kistler, studento kaj UEA-junulardelegito en 1959 en G.

Ernst GLÄTTLI

*1924. Loĝas en Brugg AG



Post la kantona gimnazio en Zuriko G. fariĝis stacidoma oficisto ĉe la svisaj fervojoj (SFF). 1949-56 li estris la regionan SFF-vojaĝservon en Liestal/BL. Li ellaboris koncepton kiel enkonduki specialajn vojaĝojn kun ekskursceloj nekonataj al la partoprenantoj. 1959-89 li laboris kiel subĉefo kaj traŭtrafika estro en Brugg, kie la emerito vivas de 1959.

G. interesiĝis pri Eo unue en 1957 per la *Eo-kurso en 20 lecionoj* de →Arthur Baur, aperinta en la fervoja organo *Der Eisenbahner* kaj en 1966/67 partoprenis Eo-kurson de Karl-Heinz Mischler en Zuriko. De tiam G. aktivadas seninterrompe unuavice en la fervojista Eo-movado: 1966-80 kaj denove de 1988 li estis la sekretario de SAEF, en 1972 LKK-kasisto de la 24a kongreso de IFEF en Lugano/TI, de 1973 delegito de SAEF ĉe UAISF, de 1988 komitatano de SAEF ĉe IFEF. Ekde 1967 li helpis al la organizantoj de Eŭropa Feria Semajno de SAEF. Sed li prizorgis ankaŭ la telekurson *Eo per Post* kaj kunlaboris en la fakprelega komisiono de IFEF. Li sinkronizis la akompanajn tekstojn por sonfilmoj prezentitaj dum diversaj svisaj Eo-aranĝoj (*Per la dentrela fervojo al la estonteco, Ridetas la lago, La tendenco de nia epoko, Libera vojo, La San Gotardo kiel peranto inter nordo kaj sudo*). Ekster la fervojista medio G. rolis kiel vicprezidanto de LKK de la 64a UK (Lucerno 1979), responsante pri ĉiuj dumkongresaj ekskursoj kaj pri la postkongreso en Interlaken/BE. Dum multaj jaroj G. estis kaskontrolanto de SES (1970-97), krome membro de la zurika ES, apoganto de KCE kaj JES, dumviva membro de UEA (de 1968), ĝia delegito kaj ofta UK-vizitanto. Post la emeritiĝo (1989) li partoprenis la IFEF-kongresojn kaj de 1989-2000 helpis pliriĉigi la programon de IFEF-kongresoj per ĉiujara prezento de perdiapozitiva fakprelego (entute 12) pri novaĵoj de SFF. Pro multaj meritoj G. estis nomita honora membro de IFEF (2001).

→Fervojistoj →Argovio

Bruno GRAF

*1928. Loĝas en Ittigen BE



Post la trapaso de la lernejo por trafiko kaj komerco en Lucerno G. fariĝis oficisto ĉe la svisa poŝtentrepreno en Biel-Bienne/BE (1948-60) kaj poste laboris kiel supera oficisto kaj sekciestro en la kleriga sekcio de la ĝenerala direkcio de PTT en Berno (1961-91), krome li estis oficiro de la armea poŝto.

G. lernis Eon en 1948 memstude kaj per la koresponda kurso de SES (supera diplomo de SES) kaj aliĝis al la Eo-movado en 1950. Movade plej aktiva li estis dum la 1950aj jaroj: en 1951 li kunfondis la junularsekcion de SES (posta EJS), en 1958 li estis fonda membro de EES, en 1956-58 prezidanto de SES. Post longa foresto de la Eo-movado en 1997 G. reaktiviĝis post la pensiigo kaj estis denove elektita kiel prezidanto de SES (ĝis 2006). G. gvidis kursojn, vizitis aron da U-Koj kaj estas dumviva membro de UEA.

→Svisa Esperanto-Societo →Junularo →Antologio



Trudi kaj Bruno Graf

GRAJNOJ EN VENTO

Lerneja projekto de la instruisto → *Marcel Erbetta* (1911-96) en Biel-Bienne/BE kun la celo starigi *Tutmondajn Interlernejajn Rondojn* por akceli la kulturen interŝanĝon inter gelernantoj kaj progresigi la instruadon de Eo en la lernejoj, krei reton de infanaj rondoj sur la tuta tergloba, pruvi la taŭgecon de Eo por la interrilatoj de tutmondaj gelernantoj kaj partoprenigi la infanojn en la internacia kunlaboro. Fakte G. estis unu el la pozitivaj fruktoj de la kunlaboro inter praktikantoj de la pedagogia Freinet-movado, kiu propagandis la uzadon de Eo por ebligi senperan interŝanĝon kun klasoj el la tuta mondo. Erbetta, kiu mem praktikadis la Freinet-metodon, informis siajn gelernantojn pri Eo kaj komencis esperantigi iliajn kontribuojn por la internaciaj interlernejaj interŝanĝoj. Li perfektigis tiujn ĉi interŝanĝojn pere de la formo de rondoj de klasoj sub la franclingva nomo 'Graines au vent', kiun Erbetta esperantigis per 'G. en vento' (laŭ Claude Gacond la esperantigo 'Semoj venten' estus pli esperanta, ĉar la franca vorto 'graine' fakte signifas 'semon' kaj ne 'grajnon'). Sed lia esperantigo evidente pli trafte respegulis la francan lingvon kaj estis pli poezia! - kio eble favoris la sukceson de lia entrepreno.



Klaso de Grajnoj en vento de Marcel Erbetta

Per la kajeroj de G., ekaperintaj en marto 1956, la gelernantoj ricevis la okazon interŝanĝi proprajn verkaĵojn kun dekduo da aliaj klasoj en diversaj landoj kaj uzadi Eon en la interlernejaj kontaktoj. La rondoj konsistis el klasoj kaj grupoj. Ĉiu rondo eldonis trifoje jare komunan kajeron kun la verkoj de

la gelernantoj inter ses- kaj dudekjaraj. La verkaĵoj estis tekstoj pri la reala vivo en la hejmo, lernejo, vilaĝo, urbo, lando, pri kutimoj, ludoj, festoj, ĝojoj kaj malfeliĉoj. La kajeroj enhavis desegnaĵojn, bildojn, fotojn, prospektojn, sekigitajn florojn ktp. Ĉiu kunlaboranta klaso (grupo) devis sendi al la rondo po 20 ekzempleroj por ĉiu eldono de la gazeto.



Unua kajero de Grajnoj en vento aperinta en marto 1956

Kiam en 1957-67 ĉi tiu agado alvenis al sia kulmino, funkciis rondoj (biela, aŭstra, franca, angla, zagreba, jugoslavia, slovena, estona, bulgara, urugvaja) en 11 diversaj landoj. Ekzemplo de la praktika agado de Erbetta estis lia somera rondvojaĝo tra Jugoslavio en 1959, kie li ĉeestis i.a. la pedagogian seminarion en Celje (Slovenio). Kun Jugoslavia Eo-Federacio Erbetta decidis organizi la unuan tutmondan seminarion por geknaboj kaj geinstruistoj sur la insulo Krk (Kroatio) en julio 1960. Unu kaŭzo de la sukceso por la formo de pluraj rondoj estis la tiama granda nombro de korespondemaj klasoj. Ĉar UEA taksis la

projekton valora pro ĝia elstara didaktika signifo por la Eo-instruado, G. ricevis la moralan apogon de la konsulta komisiono pri lernejoj de UEA kaj de EES. Sed la limigitaj financaj rimedoj de la instruistoj kaŭzis, ke preskaŭ ĉiuj elspezoj de la laboro dependis de Erbetta mem (EES povis iom kontribui al la kovrado de elspezoj). Sekve la projekto iom post iom interrompiĝis kaj ekstagnis ĉirkaŭ la jaro 1970, supozeble ankaŭ ĉar la Eo-instruado pli kaj pli malvigliĝis pro la sistema instruado de naciaj lingvoj. Pro malbona farto post motorbicikla akcidento la emerito Erbetta iom post iom forlasis sian poresperantan laboron, ankaŭ ĉar neniu pretis transpreni la torĉon, kaj la projekto finiĝis. Erbetta ordigis la kajerojn de G. kaj transdonis ilin al CDE-LI.

→Instruado →Marcel Erbetta

Kurt GREUTERT

*1927. Loĝas en Tiĉino



G. vizitis la bazan kaj fakan lernejon pri maŝina mekaniko kaj fariĝis lokomotivestro ĉe la svisaj fervojoj. En la 1950aj jaroj la denaska argoviano starigis kun Enea Albertini, Fernando de Faveri kaj Giovanni Sasselli la SAEF-grupon en Bellinzona/TI kaj per tio preparis la poresperantan agadon en Tiĉino. En 1957 li membriĝis al UEA, kies delegito li fariĝis. Kunlabore kun de Faveri G. pretigis kaj funkciigis perkorespondan kurson por itallingvanoj. Tiuj aktivecoj kondukis ankaŭ al la fondo de TEL en 1961. Por tiu organizo G. iniciatis kaj redaktis la periodaĵon *Tiĉina Informilo* (1974-81). Kiel fervojisto G. aŭ prezidis (1958-66, denove de 1973), aŭ vicprezidis (1969-72) SAEF, kaj en 1958/59

li iniciatis kaj 1965-78 redaktis la revuon *Svisa Fervojisto*. En 1967 li fariĝis ĉefkomitatano de IFEF, en 1968 svisa ĉefdelegito de UEA. En 1972, kiel sekretario de LKK, G. kunorganizis la 24an IFEF-kongreson en Lugano/TI. En *Svisa Fervojisto* (n-ro 78/1975) aperis lia detala historia skizo pri SAEF (verkita kun →Hans Bipp). Siajn grandajn organizaĵajn gvidkapablojn kaj movadajn spertojn G. disponigis ankaŭ al aliaj Eo-asocioj: en 1974 li klopodis starigi kaj prezidi propran svisan ILEI-sekcion, kiu tamen ne montriĝis vivipova; en SES li oficis kiel kasiŝto (1973-76), en UEA kiel ĝia delegito en Giubiasco, kie li ekloĝis en 1958. La kulmino de lia aktiveco estis lia prezido de la LKK de la 64a UK (Lucerno 1979), kiu estis laŭdita de UEA kiel eksterordinare bone organizita. En 1980 G. estis nomita honora membro de SES. Lige kun la administrado de la tiel nomata elkongresa kapitalo de SES estiĝis grava konflikto inter G. kaj la estraro de SES pro diverĝaj opinioj pri la uzendo de la mono; la afero finiĝis antaŭ la pacjuĝisto kaj per la eksigo de G. el SES. Sekve G. distanciĝis de la Eo-movado.

→Fervojistoj →Tiĉino →SES →Instruado



GRIZONO

Kantono en orienta, romanĉa, german- kaj itallingva Svislando, (romanĉlingve: Grischun, germanlingve: Graubünden, itallingve: Grigioni, mallong. GR: 7105 km², 188'000 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Chur (la esperantigo Kurio, proponita de PIV sub la toponimo Grizono, ne estas kutime uzata de la svisaj e-istoj).

La 12a nomaro de *Svisa Espero* (SE) en 1904 menciis la studenton aŭ instruiston →*Engelhard Pargätzi* (1885-1943) kiel probable la unuan signifan e-iston en G. Kiel fondinto de la gimnazio Knabeninstitut Rhätia en Klosters/GR Pargätzi instruis Eon en la gimnazio de Chur, propagandis la lingvon ĉe diversaj altranguloj, kontribuis al la starigo de la unua *grizona* EG (fine de 1906 aŭ komence de 1907) sub la prezido de la eksa grizona registarano kaj UEA-vicdelegito A. Manatschal

kaj raportadis en *SE* pri la disvastigo de Eo en sia kanton. En 1907 Manatschal mem prelegis en Chur pri Eo, kaj iu d-ro E. Capeder, apotekisto, laŭdita de *SE* „kiel nia fervora grizona pioniro“, aranĝis grandan ekspozicion pri Eo, pri kiu la gazeto *Freier Rätier* raportis. Poste Pargätzi transiris al Ido.



Emma Herzog kaj Jakob Schmid okaze de Esperanto-kunveno en Soloturno en 1909

De 1906 Eo estis fervore propagandata en Davos/GR fare de *Emma Herzog* (1857-1920), instruistino de lingvoj. La aktiveco de Herzog kondukis al la fondo de EK *Davos-Platz* en 1909. Al tiu EK aliĝis i.a. barono Maxim von Ehrenthal (+1915), kiu oficis kiel ĝia vicprezidanto kaj vicdelegito de UEA. Je lia enterigo lia ĉerko surhavis verdan stelon. La mondfaman grizonan sport- kaj kuraclokon Davos vizitis multaj eksterlandaj turistoj, precipe angloj. En aprilo 1910 en Davos restadis la konata e-isto Georgij Davydov (1879-1967) el Saratov, Ruslando, kiu iom vigligis la lokan Eo-vivon, antaŭ ol baldaŭ denove forveturi. Laŭ komunikoj de *SE* en 1911, aliaj e-istoj ekzistis en St. Moritz (s-ro Sachse) kaj Samedan (d-ro Ris). En 1917 restadis en G. la bulgara samideano Ivan Krestanoff, kaj en 1920 *SE* raportis, ke la instituto por knabinoj en *Roveredo* uzas Eon. Post sia edziniĝo en 1916 al Samedan/GR venis *Magdalena Grütter-Häberli* (1891-1987), frua e-istino naskita en Berno, kie ŝi partoprenis la UKn en 1913 kaj tradukis la festparoladojn de la politikaj reprezentantoj. Ankaŭ post la morto de sia edzo en 1938 Grütter restis en la Engadina valo. En 1976 ŝi translokiĝis el G. al maljunulejo en St. Gallen. En la 1970aj jaroj Grütter par-

toprenis la agadon de la Kampanjo Eo lernejen de KCE, kaj en 1979, kadre de la lucerna UK, ŝi prezidis la jarkunvenon de la *Veterana E-ista Klubo*.

Ekde la 1930aj jaroj en Flims/GR vivis kaj agadis →*Jakob Hohl* (1911-1994), instruisto de lingvoj en privata duagrada lernejo (1934-74) kaj estis kiel e-isto je la dispono de SES, KCE kaj UEA kiel delegito.

En 1954 mortis en Oetwil am See/ZH la grizonano *Jon Vital-Vital* (1879-1954), instruisto en St. Moritz. Ĉi tiu aktiva e-isto, kiu ankaŭ investis multe da tempo favore al la savo de la romanĉa lingvo, en 1910 aranĝis kurson kun 18 partoprenantoj kaj estis la aŭtoro de *Clev da l'Esperanto*, la romanĉlingva eldono de la famaj Eo-ŝlosiloj. La regiona gazeto *Fögl Ladin* aperigis nekrologon pri li, menciante lian agadon por la neŭtrala universala lingvo.

En 1942 *SE* anoncis, ke iu s-ro Fauser klopodas starigi EG en Chur. En la 1960aj jaroj la apotekisto →*Wilhelm Haase* (1885-1969), kiu antaŭe vivis kaj laboris en Burgdorf/BE kaj Olten/SO, kie li kunordigis la Eo-agadon, evoluigis en sia nova loĝ- kaj laborloko Chur la Eo-kurson *Eo in fünf Lehrbriefen* por la privata uzado en malgranda lernrondo.

Grizon-devenaj e-istoj estis ankaŭ Martin Ardüser (1917-43 →Berno), Edwin Thomas (1935-84 →KCE), Richard Schneller (*1945 →Ĝenevo) kaj →*Johann Lutz* (1923-1992 →Lucerno), kun ties edzino Julietta Parolo. La geedza paro Lutz ekloĝis en Kriens/LU, kie ili diversrilate estis je la dispono de la loka kaj fervojista Eo-movadoj. Ardüser studis en Berno ekonomion, Thomas estis UEA-delegito en Chur ĉ. la jaro 1958. La zurika ĵurnalista →*Arthur Baur* (*1915), kiu studis en la universitato la retoromanĉan lingvon, verkis studojn pri tiu lingvo en Eo.

→La romanĉa kaj Esperanto

Mireille GROSJEAN-ROBERT

*1946. Loĝas en Les Brenets NE



Post siaj studoj de la franca kaj germana lingvoj, geografio kaj historio en la neŭŝatela universitato, G. diplomiĝis kiel duagrada instruistino. 1970-77 ŝi instruis la francan lingvon en Freies Gymnasium en Zuriko. De 1977 ŝi laboras kiel instruistino de la germana kaj de 1990 ankaŭ de la franca lingvo en la duagrada lernejo de Le Locle/NE. Lige kun la instruado ŝi kunordigas la interŝanĝon de lernejoj klasoj de la neŭŝatela kanton kun germanlingva Svislando kaj verkas la prifakan literaturon. Ŝi instruas krome geografion kaj civitanan edukadon, inkluzive de konflikto-solvado. Ŝi estas kunfondinto kaj kunprezidanto de Svisa Asocio de edukistoj pacen (ASEPAIX). Kiel nepino de Philippe Robert (1881-1930), pranepino de Léo-Paul Robert (1851-1923) kaj prapranepino de Aurèle Robert (1794-1835), ĉiuj famaj neŭŝatelaj pentristoj kaj parencoj de Léopold Robert (1794-1835), laŭ kiu la ĉefstrato en La Chaux-de-Fonds estas nomita, G. estas ĝenerale interesata pri la arto kaj kulturo de sia regiono.

G. lernis Eon en 1985 kiel rimedon por konatiĝi kun la japanaj kulturo kaj literaturo, pri kiu ŝi forte interesiĝas. Siajn lingvokonojn ŝi perfektigis ĉe KCE, kie ŝi trapasis la ILEI-ekzamenojn. 1988-94 ŝi transprenis la funkciojn de la prezidantino de la fonduma konsilio de GEP kaj de la direkta komitato de KCE, kie ŝi okupiĝis ankaŭ pri demandoj de la Eo-instruado, pedagogio kaj didaktiko. Ŝi instruis Eon en la privata lernejo La Grande Ourse en La Chaux-de-Fonds, estis estrarano de SES, oficas kiel estrino de la svisa ILEI-sekcio, fakdelegitino de UEA, reprezen-

tantino de UEA ĉe UN en Ĝenevo (de 1997), komitatanino A por Svislando de UEA kaj kunlaboras en la UK-programoj (ekde 1998). Krome ŝi aktivas kiel pedagogia konsilantino de SAT-Amikaro kaj ĝenerale respondecas pri SAT-Amikaro en Svislando. En 2006 ŝi estis elektita kiel prezidantino de SES (kun D. Weidmann ŝi dividas tiun oficon).

G. estas la patrino de Marion Bélisle-G. (*1975) kaj de Joëlle (*1978), ambaŭ e-istoj; ŝia edzo Yvon G. (1942-2006) alportis Eon al la tuta familio kaj instigis ĝin eklerni tiun lingvon. Yvon G., kiu konatiĝis kun Mireille G. en 1964, studis en la zurika politeknika altlernejo (ETH), laboris en la firmao Sulzer en Winterthur, kaj ekde 1974 daŭrigis siajn studojn en la neŭŝatela universitato por fariĝi instruisto pri matematiko, fiziko, kemio kaj biologio en duagrada lernejo (en Le Locle li instruis 1977-97). Unu monaton post kiam li eksciis, ke li havas kanceron en pankreato, li mortis en la paska lundo de 2006.

→Familioj →Instruado →Neuchâtel

→Gastejo Edmond Privat →Kultura Centro E-ista



Joëlle, Yvon kaj Marion Grosjean



ĜENEVO

Kantono en okcidenta, franclingva Svislando, (franclingve Genève, mallong. GE): 282 km², 430'800 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Genève (laŭ PIV: Ĝenevo).

Ĝ. povas esti nomata iusence la lulilo de la svisa (kaj internacia) Eo-movado kaj tial meritas apartan atenton en la historio de tiu movado. Laŭ la unua nomaro de SES (februaro 1903) estis menciitaj 14 ĝenevanoj, inter ili Alioth, direktoro de gazetara agentejo, J. Grünberg, direktoro de L'Argus de la presse,

Ernest Naville, Alphonse Privat, Théodore Renard, doktoro pri sciencoj kaj A. Steinmann, asistanta doktoro en la kantona laboratorio kaj posedanto de la domo ĉe Vieux-Collège 12, kie loĝis L.L. Zamenhof, kiam li restadis en Ĝ. Kaŭze de la Ido-krizo Renard retiriĝis en 1908 de la Eo-movado. En la tria nomaro (1903) oni trovas la nomon de →*Edmond Privat* (1889-1962), tiam 14-jara, kaj en la kvina nomaro (1903) aperis →*Hector Hodler* (1887-1920), 16-jara, *Edouard Mallet* (vd. sube) kaj ŝtatkonsilisto Thiébaud (t.e. membro de la ĝeneva kantona registaro), kiu ĉeestis la fondkunvenon de SES en Rolle/VD en tiu jaro. La 11a nomaro en 1904 listigis ankaŭ Emile Privat, la patron de Edmond. En februaro 1903 fondiĝis la *Klubo de Junaj E-istoj en Ĝ.*, sub la gvido de Hector Hodler. En septembro 1903, cetere la monato de la fondo de *Geneva E-ista Grupo* fare de Mallet, stariĝis ĉe la *Unuiĝo de Junaj E-istoj de Ĝ.* du grupoj de junaj korespondantoj (grupo de knaboj kaj grupo de knabinoj). Hodler kaj Privat estis en amikecaj rilatoj kun la eminenta filozofo →*Ernest Naville* (1816-1909), kiu rekomendis Eon al la Franca Akademio de moralaj kaj politikaj sciencoj (Instituto de Francio) jam en 1899. La 1an de januaro 1904 ekaperis la revuo *La Juna E-isto (de Ĝ.)* kun daŭro ĝis 1909.



Hector Hodler, Edmond Privat kaj Théodore Renard

En tiu periodo restadis en Ĝ. ankaŭ Théophile Cart (1855-1931), prezidanto de la lingvistika societo en Parizo kaj gvida forto de la konata Societo Franca por la propagando de Eo. Aktive partoprenante la lokan Eo-vivon, li prelegis ekzemple en Unuiĝo de junaj kristanoj, en la Franca Komerca Ĉambro ktp. En la filozofia kongreso okazinta en septembro 1904 prezentis komuna 'fronto' de Eopledantoj, kiun konsistigis krom Naville an-

kaŭ lokaj eminentuloj kiel s-ro Benassy-Philippe, prezidanto de la Franca Komerca Ĉambro, H. Gourd kaj Wartheimer, profesoroj de la literatura fakultato, Ch. Fivat, direktoro de la supera komerca lernejo, P. Moriaud, profesoro de la leĝosciencia fakultato, H. Fehr, profesoro de la scienca fakultato kaj E. Chaix, profesoro pri geografio. Ĉi tiuj servis kvazaŭ kiel patronoj de la loka EG. Privat mem aranĝis kurson en la Unuiĝo de junaj kristanoj, dum Renard prelegis en la ĝeneva sekcio de la studenta asocio Zofingia kaj Mallet en la supera komerca lernejo kaj en la Geografia Societo.



Ernest Naville kaj Théophile Cart




Du fotoj de Henri Dubois

En septembro 1905 estis fondita la *ĝeneva EG La Stelo* sub la estro →*Henri Dubois* (1859-1919), kies nomo aperis en la 10a

nomaro en julio 1904. Laŭ indiko de *EdEo* li estis la frato de la neŭŝatela Eo-pioniro → Alfred Paul Dubois. Henri Dubois, kiu apartenis al la organizantoj de la 2a UK en Ĝ., prezidis La Stelon dum 16 jaroj. Dum longa periodo li aranĝis kun sia samnoma filo, kiu en 1903 estis membro-fondinto de la Junaj E-istoj de Ĝ. kaj membro de la komitato de La Stelo, diversajn vesperajn kursojn. Dum la filo mortis tro frue, la du filinoj vigle partoprenis la laborojn de la patro. Lia filino *Stelle Dubois* membris en La Stelo fakte dum pli ol duona jarcento!

En sia unua entuziasmo la ĝenevaj e-istoj insistis organizi la 2an UK en 1906. Ĝi disvolviĝis en la Victoria-halo kun 1200 partoprenantoj kaj kun la persona ĉeesto de L.L. Zamenhof. (Sur la muro de la domo ĉe adreso Vieux Collège 12 en Ĝ., kie loĝis Zamenhof dum la UK, en 1934 aperis memorŝildo honore al li; la tabulo estis renovigita en 1984; →L.L. Zamenhof en Svislando)



René de Saussure (maldekstre) kaj Edouard Mallet (Soloturno 1909)

La kongreso brile efektiviĝis, sed fakte elĉerpis la fortojn de ĝiaj aranĝintoj (→Universalaj Kongresoj). Privat iom retiriĝis de la estraraj aktivecoj de la ĝeneva EG kaj trovis taŭgan anstataŭanton en la persono de →René de Saussure (1868-1943), la frato de la eminenta lingvisto →Ferdinand de Saussure (1857-1913), anoj de signifa ĝeneva familio. René ege ekinteresiĝis pri Eo okaze de la UK, kien li estis delegita de sia frato, kaj baldaŭ transprenis diversajn funkciojn. Unue li starigis Centran Sciencan Oficejon en strato Bovy-Lysberg 8, kiu servis kiel administrejo de

Internacia Esperanta Sciencasocio, fondita dum la UK, kaj kie estis redaktata ankaŭ *Internacia Sciencasocio Revuo*, lanĉita de de Saussure. Pli kaj pli tiu oficejo, kie ankaŭ povis loĝi la malriĉa Hodler, fariĝis ne nur unu el la centroj de la ĝeneva Eo-movado, sed ankaŭ la ĝermego de la poste fondita Universala Eo-Asocio (UEA). Fine de 1906 do ekzistis en Ĝ. samtempe pluraj Eo-ĉeloj: la unua ĝeneva EG de s-ro Muschamp, la Esperanta Societo La Stelo (Henri Dubois), La Junaj E-istoj de Ĝ. (fondita de Privat kaj Hodler en 1906) kaj la Centra Sciencasocio de de Saussure. Aldone *Svisa Espero (SE)* komunikis la ekziston eĉ de du aliaj EG, nome *Klubo Radio Ĝ.* por 13- ĝis 18-jaraj gejunuloj (fondita en oktobro 1904 kaj prezidata de Alf. Monod) kaj la loka EG en *Carouge* (gvidata de E. Damon-Pichat). Krom La Stelo en tiu tempo ekzistis laŭ la *Jarlibro* de UEA ankaŭ la *Ĝeneva Esperantista Laborista Grupo* (Henriette Ith-Daneil), kies anoj kunvenis ĉiuvendrede en la Popoldomo (Maison du Peuple), la *Laborista Progreso*, la *Grupo Zamenhof* kaj *Grupo de Oficistoj de Poŝto-Telegrafo-Telefono kaj Fervojo* (GEPTEO).

Ĉar tiu displitita organiza strukturo estis malkontentiga, oni sentis la neceson de komuna ĝeneva centra komitato por kunordigi la agadon de tiuj establoj. Kiel prezidanto de tiu CK estis elektita de Saussure, kiel sekretario la ruso Nikolaj Evistifeiff (1866-?), kiu en tiu tempo restadis en Ĝ.; la ceteraj anoj estis Hodler, Dubois, Mallet kaj Caburet. En majo 1908 tiu CK organizis specialan festeventon, dum kiu Hodler ekklarigis siajn ideojn kaj la taskojn de →*Universala Eo-Asocio (UEA)*, kiu oficiale fondiĝis la 28an de aprilo 1908 en Ĝ. Per tiu dato eblas konkludi la unuan etapon de la Eo-movado en Ĝ., kiu kulminis fakte per la starigo de asocio, kies graveco por la plua evoluo de la internacia Eo-movado ankoraŭ ne estis antaŭvidebla.

Esencan apogon en la starigo de UEA en Ĝ. la juna asocio ricevis per la duobla aliĝo de →*Eduard Stettler* el Berno kaj de →*Hans Jakob*. Stettler venis al Ĝ. en 1909 kaj Jakob el Germanio en 1912 por helpi Hector Hodler en la ĝeneva sidejo de UEA. Ambaŭ okupis plurajn responsoplenajn funkciojn en UEA. En 1925 aperis en Ĝ. ankaŭ la internacie konata Eo-pioniro kaj planlingvisto *Petro*

Stojan (1884-1961) el Ruslando, kie ĝis 1931 li helpis en la oficejo de UEA por redakti la revuon *Esperanto* kaj kie en 1929 li aperigis sian faman *Bibliografion de Internacia Lingvo* (→UEA). En la tempo de la organiza dueco UEA-IEI (1936-47) la ĝeneva Serva Centro de UEA situis en Palaco Wilson, domo en kiu rezidis diversaj internaciaj organizaĵoj, dum la Centra Oficejo de UEA mem instaliĝis en Britio, poste en Nederlando. (→UEA) En 1912 Edouard Mallet anoncis la starigon de la *Nova Klubo Eo*. Mallet, kiu fariĝis doktoro pri filozofio kaj universitata docento, dum la unua mondmilito sindone dediĉis sian liberan tempon al la helpagado de UEA; lia fratino Eudoxia (+1918), fervora katolikino, okupiĝis pri germanaj milit- kaj civilkaptitoj en Francio.



Eo-vendejo en Ĝenevo en 1906

En 1913 René de Saussure forveturis pro privataj kialoj al Berno kaj mem ekokupiĝis pri reformoj en la lingvo Eo, senutilaj laŭ Hodler; iom post iom de Saussure distanciĝis de la Eo-movado, kiu skeptike registris lian evoluon kiel eterna lingvo-reformemulo, kaj praktike perdis la kontakton kun ĝi. En 1920, la jaro de la tro frua morto de la 33-jara Hodler, estis fondita la *ĝeneva klubo gimnaziano*, sed kiel longe ĝi ekzistis ne estas konate.

Multe pli longdaŭra kaj esenca estis la agado, kiun Edmond Privat, intertempe plenkreska personeco estiminda, efektivigis dum la 1920aj jaroj en Ĝ., en Svislando kaj internacie. Ĉi tiu probable plej signifa svisa pioniro de Eo markis kun siaj plenaj prestiĝo kaj forto tutan jardekon, eĉ la tempon poste. Ekde 1920 Privat kunlaboris kun →Ligo de Nacioj en Ĝ., kie li deĵoris kiel tradukisto por la angla kaj franca lingvoj kaj engaĝiĝis cele al la akcepto de rezolucio por enkonduki Eon kiel oficiale instruatan lingvon en la lernejojn de la mondo. Tre fervoran kunorganizanton de fakaj konferencoj pri Eo Privat trovis en la signifa ĝeneva pedagogo →*Pierre Bovet* (1878-1965), alia romanda apoganto de la zamenhofa idealo, kiu agnoskis Eon kiel lingvon por propedeŭtikaj celoj. Bovet estis direktoro de la Instituto Jean Jacques Rousseau kaj de la Internacia Oficejo por edukado.




Hans Jakob en sia ĝeneva oficejo

La agado de Privat kaj Bovet alportis konkretajn fruktojn. Laŭ raporto de la revuo *Esperanto* (n-ro 3/1921) la registaro de la ĝeneva kantonon montris sin tute favora al Eo-eksperimento kaj permesis enkonduki la instruadon de Eo en la klasojn de la sepa (lasta) jaro de ĉiuj unuagrada lernejoj kiel oficialan provon. Albert Rudhardt (+1944) nomiĝis unu el la lernejoj instruistoj, kiuj aliĝis al Eo en 1922 dum la tempo de la deviga instruado en la sepa klaso. Kiel oni povis legi (*Esperanto* 1/1928), en postaj jaroj la universitato de Ĝ. decidis enkonduki oficiale la instruadon de Eo en sian beletran fakultaton. Dum du jaroj Privat estis vokita kiel

regula instruisto en la universitato pri la historio kaj instrumentoj de Eo.

Antaŭ 1910 aliĝis al la Eo-movado la franc-devena sinjorino *Maria Milsom* (pseŭdonimo: E. Ramo, 1851-1933), kiu aktive partoprenis la grupan vivon en Ĝ. kaj kiu krome pioniris en katolikaj Eo-rondoj. Ŝi pretigis la tradukon de svisaj rakontoj, kiu en 1908 aperis en libro sub la titolo *En Svislando*. Krom tio ŝi tradukis kaj eldonigis (ĉe UEA en 1911) i.a. la faman romanon *Fabiola* de kardinalo Wisemann (→Literaturo, beletra)



Prospekta kajero pri Ĝenevo el la tempo de Ligo de Nacioj

En multaj rilatoj valora por la juna Eo-movado estis la kontribuo de *Rinaldo Borsa* (1893-1975), licenciito pri politikaj kaj sociaj sciencoj, e-isto de 1920, membro de La Stelo kaj UEA-delegito en Ĝ. Kiel kunlaboranto de Monda Organizo pri Sano (WHO), li estis enplektita en la agado de la internacia organizaĵo kaj povis utili kiam estis gvidataj Eo-kursoj por poŝtistoj, kiam kun Privat estis fondita Ĝeneva Radio, organizita la 17a UK, Eo instruata en la unuagradaj lernejoj kaj

kiam Ligo de Nacioj traktis la demandon de neŭtrala universala lingvo.

Okaze de la 17a UK en Ĝ. En 1925 *Paul Bouvier* (1889-1974), frato de Yvonne Privat-Bouvier, la edzino de Edmond Privat ekde 1926, instruis Eon al ĝenevaj policistoj, servantaj al la kongresanoj. Lerninte Eon en 1905 kun siaj gimnaziaj kolegoj Privat kaj Hodler, Bouvier, longe estis je la dispono kiel kasisto de la ĝeneva EG La Stelo, kies honora membro li fariĝis, gvidis multajn Eo-kursojn en sia urbo, tradukis turisman broŝuron pri Ĝ. (1925) kaj ĉiĉeronis por multaj fremdaj e-istoj vizitantaj Ĝ. En 1948 li gvidis la unuan Eo-kurson disaŭdigan de la Ĝeneva Radio, dialogante ĉemikrofone kun siaj filinoj. Krome Bouvier, kiu profesie estis fakulo pri asekuro, membris en la defenda komitato de UEA (1936-47) kaj kunlaboris en la E-ista Interhelpo, servo kreita de UEA dum la milito.

Dum la ĝeneva UK de 1925 prelegis en la Somera Universitato en Eo la psikoterapiisto kaj filozofo →*Charles Baudouin* (1893-1963) pri la temo 'Kulturo de la spirita forto'. Baudouin lernis Eon kiel knabo, poste kunlaboris kun Pierre Bovet kaj fidele pagis sian kotizon al La Stelo.



Pierre Bovet kaj Edmond Privat

En 1920 mortis *Jules Forestier*, franco vivinta en Ĝ. kaj en sia kastelo en la apuda franca departemento Ain; dum kelkaj jaroj li estis la reprezentanto de la franca registaro en (H)indoĉinio. Forestier partoprenis Eo-kongresojn antaŭmilitajn kaj oficis kiel t.n. garantianto de UEA en Ĝ., kies dumviva membro li estis. Li membris ankaŭ en ĉiuj

fakaj societoj e-istaj tiam ekzistantaj kaj estis tre ŝatata gasto en la tiama CO de UEA (rue de la Bourse) kaj de la ĝenevaj Eo-grupoj, kiujn li malavare subtenis, kiel Hans Jakob notis en sia biografia kolekto. En la sama jaro forpasis ankaŭ Félix Wohlgrath, dumviva membro de UEA, kaj s-ino Wartmann, aktiva membro de La Stelo.



Paul Bouvier kaj Charles Baudouin



Paul Bouvier kaj Anita Altherr-Perič dum pacmarŝo

Inter la ceteraj aktivuloj de tiu periodo indas menci:

→ *Alice Muller-Noguet* (1903-86) lernis Eon antaŭ 1925 sub la influo de Andreo Cseh en Vallorbe/VD kaj de Edmond Privat en Ĝ. Ŝi estis UEA-delegitino, partoprenis la ĝenevan UK en 1925, la bernajn UK en 1939 kaj 1947 kaj multajn renkontiĝojn de SES. Post sesjara restado kun sia edzo (pastoro Muller) en Francio ŝi revenis al Ĝ. Familiaj okupoj kaj 25-jara laboro en Universala Kristana Konsilio dume distancigis ŝin de la Eo-movado. Tamen ŝi daŭre membris en La Stelo, SES kaj ankaŭ KELI. Post sia emeritiĝo ŝi pli ofte reaparis en la ĝeneva EG.



Du fotoj de Alice Muller-Noguet

→ *Henri Vatré* (1908-98), e-isto de 1927, 1931-32 ankaŭ kunlaboris en la ĝeneva oficejo de UEA kiel ĝia bibliotekisto kaj gvidis kurson en la popola universitato. Poste li valore kontribuis al esperantologio sur la kampo de la Eo-literaturo, kiun li profunde konis, kiel recenzanto, scienca analizanto, statistikanto kaj verkisto. Lia unua edzino (ekde 1935) *Juliette Vatré-Baudin* (1910-37), kiu e-istiĝis en 1928, dum kelkaj jaroj same kiel Vatré oficis ĉe UEA en Ĝ. kaj kunfondis la ĝenevan EG Zamenhof.



Henri Vatré, Juliette Baudin Vatré kaj Alfred Rehmman

En 1927 forpasis en Ĝ. en sia 62a jaro *Rodolphe Horner*, sviso, iama internacia sekretario de la Kristana Unio de junaj viroj (YM-CA) kun ĝia centro en Ĝ. Horner faris vastajn vojaĝojn kaj laboris en Usono, Portugalio, Hispanio, kiel oficiala delegito li reprezentis la Ruĝan Krucon en la postmilitaj UK Prago, Helsinki, Nürnberg kaj Vieno, kaj estis prezidanto de EG en Ĝ.

Henri Vuille (1906-92), la frato de *Madeleine Stakian* (vd. sube), estis e-isto de ĉ. 1928 kaj aktivulo en la svisa naturamika movado. *Louise Vuille* (1901-94) estis la fratino de

Madeleine Stakian, e-istino de 1932. Nadejda Oumansky (1875-1945), e-istino de 1910, multe tradukis el la rusa literaturo en Eon; la frizisto Joseph Reisinger (1872-1947), kiu sekvis en 1920 kurson de Privat, helpis al rifuĝintoj de la nacisocialisma reĝimo. Li restis en la memoro kiel bonkora kaj talenta versfaranto. Lyda Raviola-Nussbaum (1890-1982) naskiĝis de svisaj gepatroj en Sankt-Peterburgo (Ruslando), tie vivante ĝis ĉirkaŭ sia dudeka jaraĝo, kaj plurfoje estis prezidantino de La Stelo. Angelo Latina (1908-81) estis harfrizisto, kiu aktivis en La Stelo precipe en la 1930aj jaroj, kaj ankaŭ André Lamouille (1908-81) kaj Paul Aeby (1903-88) apartenis al La Stelo en la 30-40aj jaroj. Aliaj anoj nomiĝis la SAT-ano Joseph Vercellinati (1886-1948), Emil Herrmann (+1986), Charles Max Gossweiler (1914-94) kaj *Emile Curtenaz* (1896-1969) el Carouge, desegnisto ĉe la ĝenevaj gas- kaj elektroservoj, e-isto de 1934 pro influo de lia filino, kiu sekvis infanan kurson de Henriette Ith.



Anita Masé kaj Hans Altherr, Marcel Moreillon

Plurajn jarojn Curtenaz prezidis la ĝenevan EG La Stelo. Kiam li opiniis, ke Eo estas maljuste traktata de ĝiaj eksteraj kritikantoj, li ne hezitis sendi trafajn artikolojn al la ĝeneva gazeto *La Suisse*. Kiel emerito li daŭrigis verki artikolojn por la loka gazeto *Courrier de la Côte*. Cetere li desegnis kelkajn portretojn de pioniroj por la UEA-Jarlibro (ekz. de 1937) kaj faris multajn servojn kiel UEA-delegito en Ĝ. Ĉirkaŭ 1945 li instigis Paul Bouvier kaj Alfred Rehmann restarigi la Eomovadon kvazaŭ mortintan en Ĝ., kun la helpo ankaŭ de Madeleine Stakian.

Krom ĉe Ligo de Nacioj, kie kunvenis la politikistoj, kaj en la lernejoj, kie pedagogoj kaj instruistoj klopodis progresigi Eon, gravaj planlingvaj diskutoj en Ĝ. disvolviĝis ankaŭ kadre de la konferenco de lingvistikaj esploroj, kunvokita de International Auxiliary Language Association (IALA). Ĝi okazis de la 20a de marto ĝis la 2a de aprilo 1930 kaj arigis signifajn personecojn el lingvistiko kaj protagonistojn de planlingvoj. Sur ĉi tiu platformo kolektiĝis eminentaj lingvo-sciencistoj, kiuj opiniis, ke indus okupiĝi science pri la demando de la neŭtrala universala lingvo. (→IALA). Jaron poste, en 1931, okazis la dua internacia lingvista kongreso en Ĝ., kie rimarkindan prelegon faris la dana lingvisto Otto Jespersen (1860-1943), la aŭtoro de la planlingva projekto Novial.



Ardachès Stakian, aŭstraliano Ralph Harry, Madeleine Stakian-Vuille kaj Emile Curtenaz

En 1940 mortis la 28-jara Marguerite Pierrat, kaj en 1941 forpasis Amélie Blondel, aliaj aninoj de la loka EG. Pro akcidento en la montaro dum la militservo pereis en 1945 la membro Ernest Schweingruber, inĝeniero en Ĝ. kaj edzo de virino el Rumanio. „S-ro Grubero“ vivis dum jaroj en Orléans (Francio) antaŭ ol reveni Svislandon por la militservo. En 1944 nova prezidanto de La Stelo fariĝis *René Petitpierre*. En 1946 ekloĝis en Ĝ. *Jenő Lenyei* (1921-88), hungar-devena blindulo kaj profesia pianisto, kiu ludis en la radiostacio de la UN-Palaco kaj akiris la ĝenevan civitanecon en 1961.

Lerninte Eon kiel junulo (en 1934), Lenyei entuziasme praktikis ĝin dum la tuta vivo.



Jenö Lenyei ludas pianon

En 1964 ekaperis la nova informilo de La Stelo sub la titolo *Brasikfolio*. 1964-72 hektografite produktita sub la grupa prezidanteco de Hans Altherr (*1914), dua edzo de → *Anita Altherr-Perič* (*1928). Multajn jarojn ĉi tiu sloven-devena italino aktivis en La Stelo kiel ĝia prezidantino, sekretariino, instruistino, redaktorino de *Brasikfolio*, kiel UEA-delegitino kaj kultura agantino.

Ekde la duono de la 1970aj jaroj dum longa periodo *Brasikfolio* estis prizorgata de → *Madeleine Stakian-Vuille* (1910-2004), kiu multajn jarojn servis al La Stelo kiel ĝia prezidantino (ĝis 1994).

Madeleine Stakian, kiu partoprenis multajn Eo-aranĝojn, en- kaj eksterlande, kutime estis akompanata de sia armen-devena edzo *Ardechès Stakian* (1909-98), kiu aktivis kiel komitatano en la ĝeneva EG La Stelo, plenumante diversajn gvidajn funkciojn.

En 1975 mortis en sia 85a jaraĝo Alfred Rehmann, kiu travivis sian junecon en Bazelo kaj translokiĝis al Ĝ. Li frue lernis Eon, regule ĉeestis kaj ofte partoprenis la Eŭropajn Feriajn Semajnojn de SAEF.



Anita Altherr-Perič kaj Arlette Di Vetta teatrumas en Ĝenevo



Ĝenevaj e-istoj: de maldekstre Anita Altherr-Perič, Kleno Fantin, Odette Fregonara, Nicole kaj Claude Piron, Arlette Di Vetta kun fianĉo, antaŭ ili Paul Bouvier

En aprilo 1994 la redaktado de *Brasikfolio* estis transprenita de Andres Bickel (vd. sube), poste ankaŭ de Jean Rawyler kaj Louis Vidonne, kaj presita ĉe la presejo Pot. Intertempe aliĝis al La Stelo ankaŭ la sekvaj personoj:

Marcel Moreillon (1907-2004), kiu studis komercon kaj teknikan kemion, kiu laboris ĉe la krajon-firmao Caran d'Ache, estis delegito de UEA inter 1956-60 en Ĝ. kaj sekretario de la svisa sekcio de KELI; *Gisèle Weill-Schneck* (1912-2004), kiu naskiĝis kiel judino en Pressburg/Bratislava, de kie ŝi translokiĝis al Bazelo, kie ŝi doktoriĝis kiel dentku-

racistino. Antaŭ ol loĝi en Ĝ. ŝi pasigis 25 jarojn en La Chaux-de-Fonds kaj 13 jarojn en Renens/VD kaj estis adeptino de la J.E.A.N.-movado. En la Eo-movado ŝi alvenis fine de la 1960aj jaroj, kie ŝi membriĝis en SES kaj UEA kaj rolis kiel bibliotekistino kaj vicprezidantino de La Stelo ĝis 1994, instruante laŭ la Rika metodo. Eva Vischer (*1928) en Confignon/GE estas la patrino de Andres Bickel. Xaver Willimann estas oficisto kaj iama UEA-delegito. Aliaj nomoj estas Philippe Vaucher (1951-78) kaj André Chavanne, iama estro de la kantona departemento pri publika instruado, kiu simpatiis kun la e-istoj dum la 70aj jaroj. La kunvenojn de La Stelo partoprenis en 1968-76 ankaŭ Richard Schneller (*1945), laŭprofesie kompostisto, poste monotipisto, linotipisto kaj nun korektisto en orientsvisa presejo, kaj lia edzino Martine Schneller (*1945), bibliotekistino, kiu sporade instruis Eon.



Zora Masé, Hans Altherr

Kun la celo laŭgrade starigi daŭran informstrukturon, la ĉefaj taskoj de *Centre genevois d'information sur l'espéranto*, fondita en 1982, estis: organizi sisteman respondadon al informpetantoj, ekfunkciigi Eo-kursojn ĉe fama kulturklubo, aranĝi informstandon dum ĉiusomera muzik- kaj kultur-festivalo junulara en Ĝ., publikigi pri siaj Eo-aktivecoj novaĵ-bultenon dissendotan al la okcidentsvisa e-istaro kaj simpatiantoj de Eo. La centro estis gvidata de →Andres kaj Camille Bickel, →Claude Piron, Jacques Dudoignon kaj Jeanne Marie Laurentie. 1982-86 aperis 6 numeroj de la informilo *Espéranto-Réalités*. En 1986 la centro ĉesis funkcii.

→Andres Bickel (*1954), juristo, kiu praktikas la profesion de fervojisto, en 1974 kunfondis la *genevan junularan EG*, estis komitatano de la ĝeneva EG La Stelo, redaktoro de *Brasikfolio* (1974-78). En 1977 li fondis, kun aliaj, la teatran kaj kantan trupon *La Vagabondoj* (→Junularo). Lian agadon partoprenas ankaŭ lia edzino Camille Bickel-Perrin.



Claude Piron, Andres Bickel kaj Furio Gabrielli

La belg-devena psikologo →Claude Piron (*1931), kiu iam laboris ĉe UN kiel tradukisto, kaj lia edzino Nicole ofte kontribudis al la Stelo per prelegado, publika varbado kaj Eo-instruado.

En 1982 Kooperativo de →Literatura Foiro malfermis sidejon en Ĝ., kie la revuo *Literatura Foiro* aperis dum dek naŭ monatoj (la sidejo estis fermita en 1984). Kunlaboris kun tiu oficejo kaj kun la redakcio de *Transalpa E-isto* kaj kun LF-koop i.a. Arlette Di Vetta-Mouron (*1941), profesia librotenistino, lerninta Eon en 1950/51 en la ĝeneva EG La Stelo, al kiu ŝi servis kiel kasistino dum multaj jaroj (ĉ. 1960-80).

Armand Cotton (*1932) estas emerita inĝeniero pri klimatizado kaj mekaniko, kiu fariĝis e-isto en 1970 tra la J.E.A.N.-movado de →Marc Rohrbach. En 1973 li kaj Yvonne Cotton partoprenis, kadre de delegacio de Monda Asocio por la lernejo kiel pacinstrumento (EIP), starigita de →Jacques Mühlethaler en Ĝ., en monda packongreso en Moskvo.



Arlette Di Vetta kaj Anne-Marie Briner



Gisèle Weill-Schneck; Christiane Sixtus Pot kaj Ardachès Stakian

Kiel docento en la traduk-lernejo de Ĝ. laboris ankaŭ →Furio Gabbrielli (*1927), italdevena e-isto. La diplomita sekretariino-bibliotekistino Anne-Marie Briner (1947-2003) havis laborlokojn en urba biblioteko kaj ĉe la Ruĝa Kruco en Ĝ. Ŝi lernis Eon en 1986 kaj disponigis sin kiel prizorgantino de la biblioteko de La Stelo. *Brasikfolio* de la jaro 2003 listigas jenajn personojn, kiuj partoprenis la kluban vivon de La Stelo en tiu periodo: Anita Altherr, Charmian Common, Lucien Dahan, Arlette Di Vetta, Jean-Marc Ellwanger, Gilda Pace, Mark Ryszewski, Myriam Schwitter, Christiane Sixtus Pot (*1937), Joĉjo Tomaszczyk, Eva Fischer, Micheline Bertossa, Camille Bickel, Andres Bickel, Yvette Cotton, Armand Cotton, Patrick Perréard, Odette Fregonara, Claude kaj Nicole Piron, Furio Gabbrielli k.a. Odette Fregonara kaj Josef Tomaszczyk, higienisto, oficas kiel UEA-delegitoj por Ĝ.